

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE



*Unua vico meze:
S-ro J. J. Süßmuth
(nun en Usono),
fondinto del' klubo.
Antaŭlasta vico:
la tria persono
de maldekstre S-ro
Albert Nyberg, kaj
la kvina lia filo S-ro
John Nyberg, an-
koraŭ membroj de
la grupo.*

En la jaro 1905: La novfondita Esperantoklubo de Södertälje.
(En la paĝo 97 raporto pri la jarkunveno 1934 en Södertälje.)

N:r 6.
N-o 6.

Juni 1934.
Junio 1934.

Pris 25 öre.
Prezo 25 oeroj.

SVENSKA
ESPERANTO-TIDNINGEN
LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

Redaktör: Bernhard Eriksson.

Postadr.: Biblioteksgat. 30, Stockholm.

Tel. 10 53 27, 11 27 53.

Prenumerationspris: Helt år kr. 2:50.

Lösnummer 025.

Annonpris: 15 öre pr mm.

Utkommer en gång i månaden.

SVEDA ESPERANTO-GAZETO

Redaktanto: Bernhard Eriksson.

Adreso: Biblioteksgatan 30, Stockholm.

La administracio: Box 698, Stockholm.

Anonco pri korespondado kostas

2 respondkuponojn.

Abono eksterlanda: 1 jaro 3:— sv. kr.

Svenska Esperanto-Förbundet

(Sveda Esperanto-Federacio)

Adress: Stockholm 1.

Sekretariatets adress: Fredsgatan 4.

Postgirokonton N:r 2012.

Årsavgift för direkt anslutna medlemmar kr. 5:— inberäknat pren.-avgiften för Svenska Esperanto-Tidningen.

Ordförande: Paul Nylén, Huddinge.

Telefon: Huddinge 279.

Sekr.: Ernfrid Malmgren, Heleneborgsgat. 6, Stockholm. Tel. 41 03 04.

Svenska Esperanto-Institutet

Postadr.: Box 698, Stockholm.

Postgiro 515 11.

Avd. för examens- och språkfrågor: Rektor Sam Jansson. Tel. Lidingö Villastad. 295. — Avd. för ekonomi, statistik, kurser: E. Malmgren.

Sv. Lärares Esperanto-Förbund

(Sveda Instruista Esperanto-Federacio)

Ordf.: Thorsten Torbjär, Mariagat. 15, Göteborg.

Sekr.: Gustav Rimberth, Kommendörs-
gatan 41, Göteborg.

Kassör: Oskar Svantesson, Karl Johans-
gatan 61, Göteborg.

Årsavgift 2:— kr.

Läroböcker, Ordböcker

m. m.

Systematisk kurs i Esperanto. Av Seppik-Malmgren. En enkel och lätt lärobok för nybörjare... 0:75

Esperanto utan förkunskaper. Av Harald Skog o. Sam Jansson. 0:50

Övningsbok till d:o. 0:50

Snabbkurs i Esperanto. Av Seppik-Malmgren. Särskilt avsedd för hotell-, restaurant-, bank- och trafikpersonal 0:60

Kurs i Esperanto. Del I. Av Fritz Lindén. Synnerligen enkel. . . 0:90

D:o. Del II. Läsebok. 0:90

Lärobok i Esperanto för A.B.F. och andra studiecirklar. Av Jan Mas-
siak. Inb. 2:50

Kommentarer till d:o. 1:—

Esperanto-Kurso. Av V. Setälä. En enkel och trevlig läsebok. Ill. 0:50

Esperanto-Grammatik. Av Lärov-
adj. Nils Nordlund. 1:50

Nyckel till Esperanto. Miniaturläro-
bok med ordlista. 0:10

Dubbel Fickordbok i Esperanto. Av Carl Ohlsson. Svensk-Esperantisk o. esperantisk-svensk ordbok. 1:50

Esperantisk-svensk Ordbok. Av P. Nylén. 232 sid. Häft. 3:75

D:o, inb. i hållbart klotb. 5:—

Svensk-Esperantisk Ordbok. Av G. H. Backman. Slutsåld.

Barbro kaj Eriko, en trevlig läsebok, helt på esperanto 0:60

Prepositionerna i Esperanto. Av N. Nordlund. 0:75

Fundamenta Krestomatio. Av D:r L. L. Zamenhof. Läsestycken avsedda att utgöra mönster för god esperantostil. 3:25

Dialogoj en Esperanto. Por kursoj kaj grupaj kunvenoj. Av Einar Dahl. 32 sid. 0:50

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

Box 698, Stockholm 1. Postg. N:r 578.

Tel. 31 65 01.

Kont. o. exp.: Sveavägen 98 5 tr. Kl. 9-17.

Order överst. 10 kr. försänd. portofritt. Vid ins. av förskottslikvid för mindre order bif. 10 proc. till portokostnader. Fullständig prislista på begäran gratis och franko.

ESPERANTO-TIDNINGEN

LA ESPERO

ORGAN FÖR ESPERANTORÖRELSEN I SVERIGE

La jarkunveno de S. E. F. 1934.

Kun bela vetero kaj la suno sur klarblua ĉielo la malgranda idilia urbo Södertälje ĉi-jare akceptis la jarkunvenon de Sveda Esperanto-Federacio. Ĉion tre bone aranĝis la energiaj samideanoj en la esperanta klubo Progresado en Södertälje. Ni jam en la maja numero menciis pri tio ke Progresado estas klubo kun tradicioj. Samtempe kun la nuna jarcento ĝi naskiĝis. Tiam ĝin gvidis nia konata samideano J. J. Süsmuth, nun unu el la gvidantoj de la Esperanto-movado en Nord-Ameriko. Bildo sur 1-a kovrilpaĝo montras la tiaman klubon. Du s-anoj el tiu tempo ankoraŭ fervore laboras por Esperanto en Södertälje kaj apartenas al Progresado, nome s-ro Albert Nyberg kaj lia filo, s-ro John Nyberg, kiuj ankaŭ troviĝas sur la bildo.

Eble oni pro la bela kaj konvena situo de Södertälje atendis multajn aliĝantojn al la kunveno, sed la mondkongreso en Stokholmo certe kaŭzis al multaj prokrasti vojaĝon en la signo de la verda stelo ĝis tiam. Bedaŭrinde por tiuj, kiuj devis tion fari, ĉar estis vera ĝojo ekoni la simpatiajn gesamideanojn en Södertälje kaj partopreni la amuzan kaj gajan kunvenon, kie ĉio okazis en plej agrabla maniero; kaj la gravajn kaj la amuzajn partojn de la programo.

Malfermo, elektoj kaj amuziĝo.

Ĉe la malferma festeno, kiu okazis en la urba hotelo, ĉeestis proksimume cent personoj el 15 diversaj lokoj. La prezidanto de »Progresado», s-ro Eric Grahn, salutis ĉiujn alvenintojn bone naj kaj transdonis la parolon al la ho-

nora prezidanto de S.E.F., red. Nylén, kiu rememorigis pri la naskiĝo de Esperantoklubo en Södertälje, pri la aliĝo de Sveda Esp.-Federacio al UEA, k.c., kaj gvidis elektadon de estraro por la jarkunveno, kiu ricevis la jenan konsiston: Prez. s-ro Einar Dahl, Uddevalla; vic.prez. s-ro Eric Grahn, Södertälje; sekr. s-ro Nils Hedgren, Stockholm; vic. sekr. s-ro Verner Hägglund, Stockholm.

La reprezentantoj nun transdonis salutojn el siaj hejmkluboj. Samtempe ankaŭ s-ro Ernst Eriksson, SLEA, s-roj F. Szilágyi, Budapest, Hans Fox, Danzig, kaj Stuit, Hollando, parolis kelkajn vortojn kaj salutis la jarkunvenon. Krom ili ĉeestis ankaŭ s-ro L. Sinha el Hindujo.

Post la solena malfermo komenciĝis tre amuza kunestado, dum kiu ĉiuj entomakigante bongustan vespermanĝon vigle interbabiladis ĝis kiam la teatra grupo el Stokholmo aperis kaj bonege prezentis du teatraĵojn, verkitaj de S. H-son. Dancado ĝis la unua horo nokte poste sekvis kaj multaj uzis la okazon pli rapide degeli la bongustan vespermanĝon.

La labora tago.

La pritraktoj komenciĝis en la pentekosta mateno pri la diversaj paragrafoj de la jarraporto. La multaj interesaj demandoj ofte kaŭzis viglan diskuton. Inter la menciindaj estas

La studa laboro.

Nia tutlanda studgvidanto, s-ro Einar Dahl, en parolado skizis tiun laboron

dum la pasinta jaro kaj esprimis kelkajn dezirojn tiurilate. Oni akcentis pri tio, ke ni devas ankaŭ al infanoj instrui nian lingvon, sed konvena libro pro tiu celo ankoraŭ ne ekzistas. S-ro Dahl tamen laboras pri tia libro. Oni ankaŭ akcentis, ke la plej bonaj instruantoj por la infanoj kompreneble estas iliaj ordinarnaj geinstruistoj. Tial la unua demando estas venki la geinstruistaron por Esperanto.

La Kongreso

kompreneble ankaŭ kaŭzis viglan diskuton, sed tiun mi ne priparolos tie ĉi, ĉar novaĵoj pri ĝi ja aperas en ĉiu numero de la gazeto.

La gazeton

oni ankaŭ diskutis kaj esprimis unu certan deziron rilate al ĝi. Nome, ke la esperanto-kluboj en la lando provu ensendi kiom eble plej mallongajn kaj koncizajn raportojn al la kroniko, ĉar tiu parto de la gazeto dum la lasta tempo minace ŝvelis.

Por la propaĝando

oni eluzu ĉiajn eblajn metodojn. Bona propono aperis, nome ke ĉiu klubo havigu al si propran afiŝtabulon, kie ili anoncu pri siaj kunvenoj kaj pri aliaj okazaĵoj en nia verda mondo. Södertälje jam havas afiŝtabulon ĉe la tre multe vizitata banparko kaj promenante sur la ĉefstrato de la urbo dum la kunvenaj tagoj, oni ankaŭ rimarkis la Kongresan afiŝon por XXVI-a sur la afiŝtabuloj de unu el la plej grandaj filmteatroj. Krom tio oni ne forgesu ĉiam surglui esperantajn markojn sur siajn leterojn ktp. Tia malgranda kaj malmultekosta reklamo povas interesigi multajn personojn kaj esti tre utila.

Oficiala danko

estis esprimata al tiuj, kiuj diligente kaj sindone oferis multe da sia tempo por korektado de ensenditaj solvoj al la perkorespondaj kursoj. Ili akceptu elkoran dankon de la tuta sveda esperantistaro.

Pri la esperanta radio

oni menciis, ke la interrilato inter la radio-servo kaj Esperanto nuntempe pliboniĝis.

La manlibroj

de S.E.F. oni tre ŝatas. Dezirinde estas, ke ankaŭ aperas libro en tiu serio pri la historio de Esperanto en konciza formo.

Kunlaboro

inter Svedlando kaj la baltaj ŝtatoj efektiviĝis. Propono pri kunlaboro ankaŭ inter Svedlando, Norvegujo kaj Danujo estis esprimata.

La nova estraro de S.E.F.

konsistas el jenaj personoj: P. Nylén, prez. kaj hon. prez.; S. Jansson, vicprez.; E. Malmgren, sekr.; T. Julin, vicsekr. kaj E. Malmkvist, kas. Anstataŭantoj H. Halldor kaj H. Lindstedt. Revizoroj N. Hedgren kaj V. Hägglund. Revizoraj anstataŭantoj H. Josephsson kaj H. Nordkvist.

En la instituton oni elektis s-ron E. Dahl por la posteno de s-ro A. Larsson, kiu eksigis.

La kunveno de la geinstruistoj

kiel ordinare okazis antaŭ la federacia kunveno. La jarraportoj estis akceptataj kaj kolektiva aliĝo al Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj (T.A.G.E.) ankaŭ estis akceptata. Por la nova jaro oni elektis s-ron T. Torbjär, prez.; f-inon Hallergren, sekr. kaj s-ron O. Svantesson, kas.

Sigvard Håkansson.

*

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

(Eldona Societo Esperanto s.p.r.) ĵarkunvenis la pentekostan lundon en la Urba hotelo de Södertälje sub prezido de redaktoro H. Halldor. 225 akcioj estis reprezentataj. Laŭ la raporto de la estraro, la pasinta jaro estis tre vigla. La libroeldonado estis vera rekordo kun 70.000 libroekzempleroj presitaj. La vendado atingis la sumon de 42.286 kr. (en 1932 36.324 kr.). La eldonitaj 11 numeroj de Sveda Esperanto-Gazeto kalkulis sume 208 paĝojn krom la kovrilpaĝoj. La meza eldoncifero estis 3.327 ekz. kaj la nombro de abonantoj je la fino de la jaro 1.200. La librokatalogo de la societo estis presata en tri eldonoj, sume 15.000 ekz. Ĝi enhavas ĉ. 400

titoiojn. La ekonomia rezulto de la agado dum la jaro estis gajno de kronoj 1.659:50. La jarkunveno decidis dividendon de 6 % kaj transporton de 1000 kr. al la rezerva kapitalo de la societo.

Post diskuto pri la manlibroj de Sveda Esperanto-Federacio — s-ro Ernst Eriksson deziris ke la anoj de SLEA povus aĉeti ilin je la sama prezo kiel la anoj de SEF — oni aprobis la raporton kaj laŭ propono de la reviziintoj deŝarĝis la estraron.

La eksiganta membro de la estraro, s-ro R. Pehrsson estis reelektata. Estraran anstataŭanton oni elektis s-ron Ernfrid Malmgren. Kiel reviziantojn oni elektis s-rojn Nils Hedgren kaj Helge Nordkvist kun s-roj Bernh. Eriksson kaj John Johansson kiel anstataŭantoj.

S-roj Nylén kaj Ernst Eriksson dankis al la estraro pro ĝia laboro por la bono de la societo, kaj la jarkunveno fermiĝis. H. H.

*

Impresoj de la jarkunveno.

La jarkunveno en Södertälje estas jam nur memoraĵo. Sed bona memoraĵo. La aranĝoj estis simplaj sed bonaj kaj la traktadoj entute objektivaj kaj interesaj.

Por la skribanto la kunveno unue donis fortan senton, kiom necesa estas tia persona renkonto inter la gvidantoj de la movado kaj la reprezentantoj por la multaj »malgrandaj» esperantistoj en la provincoj. Nun la nombro de la partoprenantoj estis malgranda — oni ja ankaŭ ŝparas por la Universala Kongreso — sed se la povo kaj la ekonomia stato de la esperantistoj estus egala al la intereso, la nombro certe estus multobla. Restas nesolvita la problemo de la faciligo de la vojaĝoj por la delegitoj al la kunveno.

La instrua demando kompreneble estis objekto de granda intereso, tion montris la diskutado dum la kunveno de la Instituto. Precipe la daŭrigaj kursoj. Pli kaj pli oni komprenas, ke ne sufiĉas nur aranĝi novajn kursojn kaj interesigi novajn personojn — estas ankaŭ necese konservi kiel eble plej multajn el la varbitoj kaj fari el ili lertajn, bonajn esperantistojn. La novaj lernolibroj, precipe tiu de Seppik-Malmgren, ricevis multan laŭdon.

La plej viglan intereson tamen tiras

sendube al si la Universala Kongreso. Miriga kaj neatendita estis la informo de la Loka Komitato, ke oni pli timas tro grandan nombron de aliĝantoj ol malgrandan. Jam nun oni kalkulas je ĉ. 2000 kongresanoj. Se tiu cifero superiĝus, neniuj kunvenejoj en Stockholm sufiĉas por ĝenerala kunveno. Speciale malĝojiga estas tiu fakto por la multaj provincoj, kiuj planis vojaĝon al Stockholm por dum unu aŭ du tagoj ĉeesti la kongreson — por ili ŝajne ne estus ebleco partopreni. Tamen oni prezentis proponon pri speciala aranĝo en tiu celo kaj ni esperu, ke la L.K. sukcesos aranĝi la aferon. Certe ĝi tiamaniere akirus la dankon de multaj centoj da esperantistoj en la provinco — kred-eble ankaŭ en Stockholm — por kiuj la ebleco dum kelkaj horoj senti ke ili estas anoj de la granda rondo familia estos memoraĵo por la tuta vivo kaj forta instigo al daŭra laboro por Esperanto.

Honoran mencion meritas la prezidanto de la kunveno, s-ro Einar Dahl, pro la certa kaj rapida gvido de la traktadoj. Lin superis en rapideco — eble — nur s-ro Halldor, kiu prezidis la kunvenon de la Eldona Societo la duan tagon. S-ro Halldor cetere plurfoje lumigis la traktadojn de la Federacio per siaj bonhumoraj, trafaj rimarkoj. La kunvenon ĉeestis kiel gasto la prezidanto de la Laborista Asocio (SLEA) s-ro Ernst Eriksson, kiu atestis pri la kreskanta kunlaboremo de la du asocioj. Aliaj konataj vizaĝoj estis tiuj de nia ŝatata honora prezidanto, s-ro Nylén, la Federacia sekretario, s-ro Malmgren, kiu sufiĉas por ĉio, la prezidanto de la Loka Komitato, s-ro Julin, kiu informis pri la kongresaj preparoj, kaj lia same energia edzino. Simpatia konatiĝo estis tiu de s-ro Grahn, la prezidanto de la klubo en Södertälje, kiu bone aranĝis la kunvenon, kaj f-ino Magda Carlsson, la aŭtorino de la ĉarmaj leteroj de »Barbro», kiu vane provis dementii, ke ŝi ne estas identa kun »Barbro» (ni tamen povas priparoli la sekreton, ke »Erik» estas antaŭ longe edziĝinta).

R. P-n.

La protestanta diservo

dum la XXVI-a okazos en Storkyrkan (la Grandpreĝejo), kaj ĝin gvidos la ŝtata eklezia pastro A. Thörnqvist el Gevle kun ev. kunhelpanto.

Kelkaj kongresaj principoj.

La kongreso en Södertälje estas for. Multaj gravaj problemoj estis diskutataj. Montriĝis, ke nia Federacio estas marŝanta.

Oni ne diskutis pri »barbo de la papo» aŭ misuzis la horojn per sensencaj deklamoj kaj vortiluminacioj.

Ni rigardis malantaŭen kaj konstatis, ke la intereso pri Esperanto sur ĉiuj kampoj pligrandiĝis. Nia interna federacia laboro plilarĝiĝis kaj fariĝis pli profunda.

For estas la tagoj de la teoriaj planadoj. For estas la pli malpli utopia periodo de nia historio. Nun ni kreas konkretajn, praktikajn faktojn. Ni ne forgesis planti la eternajn semojn de diversspeca idealismo, kiujn nia lingvo enhavas. Ni ne finis la rigardon al la celo, kiu ankoraŭ troviĝas en nebula estonteco, sed ni pli klare ol antaŭe komprenas la signifon de ĉiutaga laboro inter la homoj. Ĉion tion la rigardo malantaŭen atestas.

Dependas de niaj hodiaŭaj streĉoj kaj klopodoj, kia la estonteco formiĝos. La sukcesoj spronu nin. Maro da taskoj ruliĝas antaŭ niaj okuloj. Rostitaj paseroj ne falas en nian buŝon. Per niaj personaj faroj, bazitaj sur fervora intereso kaj vera kompreno de la enhavo kaj valoro de Esperanto, ni kreos la faktojn, kiuj disbatos obstinajn barojn. Ni ne forgesu, ke multaj vojoj kondukas al Romo. Ĉiu serĉu la sian, eluzu siajn eblecojn!

Unu el tiuj punktoj de la kongresa tagordo, kiuj logis la plej multajn paroladantojn, estis la studagado. Bona pruvo! Tio montras, ke la esperantistoj komprenas la absolutan neceson kaj klaran postulon de racia kaj celkonscia studlaboro.

Nur per persona perfektigo kaj pli ampleksa ekstera propagando, kiu donas esperantemulojn kaj esperantistojn kiel rezulton, ni masonas la firman bazon de nia movado.

Sen intenco malpliindigi la laboron en la pasinteco aŭ kritiki la fidelulojn iamajn, nun eble grizharajn kaj ripozantajn, ni povas kun fiero diri, ke la kvalito de la esperantistoj nuntempe estas tre kontentiga.

Ni faru komparon inter la esperante parolantaj kaj angle parolantaj homoj

en Svedujo. Alian komparon mi konsideras nenecesa, ĉar la aliaj t.n. mondlingvoj praktike ludas nulan rolon. Ni faru la supre proponitan komparon, memorante, ke parolantaj homoj signifas homojn, kiuj perfekte kaj flue parolas lingvon. Mi kredas, ke ni en nia lando povas registri pli da veraj esperantistoj ol da angloj.

Certe tia eldiro elvokas indignan opozicion. Certe la kontraŭuloj nomas ĝin senlima troigo. Ne gravas, kaj mi ne reprenas la aserton, ĉar mia persona sperto diras, ke oni strange malofte inter tiuj »angloj» renkontas homojn, kiuj efektive estas pli ol balbutantoj, kvankam ili mem konsideras sin bonaj.

La angla lingvo havas avantaĝojn kaj subtenojn en multaj formoj, precipe kiel lerneja temo en lernejoj ĉiuspecaj. La radio elĵetas anglajn lecionojn ĉiusemajne. Sed malgraŭ tio Esperanto produktas pli kapablajn kaj perfektajn anojn. Se oni demandas pri la kialo, la respondo estas: Esperanto estas tiel facila, ke ordinara homoj sen tro multe da tempoperdo kaj foruzo de energio kapablas ĝin lerni.

Ĝuste per tiu grada pligrandigo de la nombro de la esperantistoj ni gajnas la plej valorajn venkojn. Perfekta esperantisto estas migranta propagandilo. Ju pli da ili, des pli da efiko! Persona agitado per personaj spertoj, kiujn neni povas per vortoj neniigi, estas plej efika. Ĝi silentigas la kritikantojn, vekas la indiferentulojn kaj igas Esperanton aktuala. *Per praktiko — por praktiko*, jen, nia gvidprincipo. Floru la studagado!
Einar Dahl.

La profesia teatrogrupo,

kiu dum la XXVI-a en la teatra vespero prezentos la verkon de Aug. Strindberg »Ludi per la fajro» antaŭ kelka tempo invitis kelkajn anojn de la LKK por ĉeesti provludon. Oni devis konstati la mirinde bonan kaj belan rezulton. Post kelksemajna studado la aktoroj atingis enviindan certecon el parola vidpunkto. Gratulon al ili kaj al la instruanto, D-ro F. Szilágyi. La teatra vespero certe estos sukceso.



Oficiala invito: Sveda Trafika Asocio kune kun Sveda Esperanto-Federacio.

Adreso de LKK: Fredsgatan 4, Stockholm.

Poŝta ĉekkonto: N-ro 50443, Stockholm.

Bankkontoj: Svenska Handelsbanken, Stockholm 16; Sundsvalls Enskilda Bank, Fredsgatan 4, Stockholm.

Kotizo: Ordinara kotizo estas 25:— sved. kronoj; post 1 julio 30:— kr.

Honora prezido:

En la honora prezido de la XXVI-a Universala Kongreso de Esperanto eniris la jenaj:

Lia Moŝto Princo Carl, Duko de Västergötland, Prezidanto de Ruĝa Kruco.

Kurt Belfrage, Borsa direktoro.

B. J. Bergqvist, Teol. kaj Fil. D-ro, Eksministro.

Börje Brilioth, Fil. D-ro, Ĉefo de Intern. Gazetara Informejo.

Gustaf Dalén, Fil. D-ro, Industriĉefo.

John Forsell, Superintendanto, Profesoro, Ĉefo de la Reĝa Opero.

Axel Gauffin, Superintendanto, Ĉefo de la Nacia Muzeo.

Axel Granholm, Ĉefdirektoro, Ĉefo de la Stataj fervojoj.

A. Hamilton, Ĉefdirektoro, Ĉefo de Reĝa Telegrafo.

Felix Hamrin, Eksĉefministro, Senatano.

Per Albin Hansson, Ĉefministro.

Fritz Henriksson, Konsilanto por eksteraj aferoj.

Rurik Holm, Teol. kaj Fil. D-ro, Rektoro ĉe Slojda seminario de Nääs.

Israel Holmgren, Profesoro, Ĉefkuracisto de Serafimer-malsanulejo.

Nils Hänninger, Fil. D-ro, Konsilanto por Publika instruado.

K. H. Högstedt, Prezidanto ĉe Reĝa Tribunalo de impostkalkulado.

Adolf af Jochnick, Eksgeneraldirektoro. Prezidanto de la Rajtigitoj de Regna Banko.

Ernst Killander, Kapitano, Gvidanto de junulara sporto.

Selma Lagerlöf, Fil. D-ro, Unu el la XVIII de la Sveda Akademio.

Oskar Larsson, Urba Konsilisto.

Andreas Lindblom, Profesoro, Ĉefo de Norda Muzeo kaj de liberaera muzeo Skansen.

Carl Lindhagen, Senatano, Eksurbestro.

Leon Ljunglund, Fil. D-ro, Ĉefredaktoro, Prezidanto de la Publicista Klubo.

Fredrik Ramel, Guberniestro, Eksministro por eksteraj aferoj.

Ragnar Sachs, Direktoro.

Torsten Segerstråle, Kapitano, Ĉefo de Grand Hotel, Stockholm.

Knut Tengdahl, Ano de Asekura Konsilantaro, Prezidanto de Urba Konsilantaro de Stockholm.

Nils Widner, Teol. D-ro, Pastoro Primato, Kortega Ĉefpredikanto.

Tiel malproksime

troviĝas Stockholm, la urbo de la Universala Kongreso, ke multaj personoj timas la altajn vojaĝkostojn. Tamen la vojaĝkostoj efektive ne estas altaj, se oni konsideras la nordan situon de la urbo. Kaj se iu volas vidi kaj travivi ion specialan, tiam oni ankaŭ devas elspezi iom pli multe ol se oni veturas al la najbara urbo.

Tiel malmultekosta

estas la vizito ĉe la kongreso, ke neniu bezonas heziti pro la elspezoj. Por ke ĉiu esperantisto komprenu, ke oni ĉiel klopodis pri la bono de la kongresanoj, vi nur rigardu la kongresprogramon kun

la indikoj pri iuj festoj kaj aliaj grandiozaj aranĝoj, per kio la kongresa komitato regalos vin.

Tiel multenhava

estas nome la programo, ke ĉiu kongres-tago enkadras iun pompan feston:

Sabate: En la urba Koncerta domo: Sole-
lena malfermo, kaj en Granda hotelo:
Interkonatiĝa vespero.

Dimanĉe: En la koncerta domo: Honora
koncerto de Dalekarlia kantĥoro.

Lunde: En Ora salono de la urbodomo:
Oficiala akcepto.

Marde: En la subĉiela muzeo Skansen:
Popoldancoj el diversaj landoj. Mal-
longa festprogramo.

Merkrede: En Stata dramatika teatro:
Prezentado de du teatraĵoj el sveda
kaj ĉeĥa lingvoj. (La sveda profesia
teatrogrupo jam provludis la verkon de
Aug. Strindberg »Ludi per la fajro«.)

Ĵaŭde: En la Koncerta domo: Vespero
de literaturo, arto kaj bonhumoro kun
jam prilaborita detala programo, tre-
ege alloga.

Vendrede: En Blua salono de urbodomo:
La internacia balo. (Tiam la kongres-
anoj estas petataj porti nacian ves-
ton por kolorigi la vesperon.)

Sabate: En parlamenta domo: La sole-
na fermo.

Tiel bele

sin ornamos Stockholm dum la kongre-
so, ke la grandaj placoj antaŭ la parla-
menta domo kaj la stacidomo estos
flankitaj de esperantaj flagoj kaj flagoj
el la landoj de ĉiuj kongresanoj. La tu-
ta urbo Stockholm, »la Melar-reĝino de
l' Nordo«, plej honore akceptos la kon-
greson. Kaj la tuta urbo, jes tuta Sved-
lando, estos sub influo de nia kongreso.
Ĉar — — —

Tiel multnombre

la esperantistoj jam aliĝis al la kongre-
so, ke sufiĉas por vere plej impona ma-
nifestacio. Sed ankoraŭ troviĝas lokoj
por kelkaj centoj da kongresanoj. Kaj
vi, kara amiko, eĉ ne devas pensi pri ia
speciala helpo mona al nia kongreso.
Ĉar ĝi jam estas sukceso. Sed ni opi-
nias, ke vi certe pensas *pri vi mem* kaj
pri viaj propraj avantaĝoj. Guste por vi

la kongreso estos belega memoro por la
tuta vivo! Se vi do ne jam aliĝis, tion
nun tuj faru!

Venu al Stockholm

por praktiki Esperanton! Multaj hote-
loj, restoracioj kaj vendejoj ktp. havas
Esperanto-parolantan oficistaron. Ili
atendas vin! Kaj ili ĉiuj deziras havi
pruvon, ke vere ekzistas esperantistoj
ankaŭ en aliaj landoj. Tial: venu!

Kiu volas gajni 5 kronojn

nepre nun tuj pagu la kongreskotizon,
25 svedajn kronojn, ĉar post 1 julio la
kotizo estos 30 kronoj. La plialtigo de-
pendas de la grandaj malfacilaĵoj, kiujn
kaŭzas malfruaj aliĝoj. Pro tio vi faras
grandegan helpon al la kongresa komi-
tato, se vi baldaŭ aliĝos. Ju pli mal-
frue, des pli malfacile. Konkludo: se vi
aliĝos antaŭ la 1 julio gajnas *kaj vi kaj*
la Kongresa Komitato! Instigu ankaŭ
viajn amikojn tuj aliĝi!

Kovru viajn elspezojn

dum la kongreso per ensendo de mono
al L.K.K. En multaj landoj nuntempe
ekzistas leĝoj, kiuj malfaciligas aŭ pres-
kaŭ nebligas al partopreno de nia kon-
greso. Sed ofte estas eble transsendi
al la eksterlando malgrandan monkvant-
ton de tempo al tempo. Kaj L.K.K. vo-
lonte servas al ĉiuj kongresanoj tiama-
niere, ke vi povas sendi kiun ajn mon-
sumon al la kongresa bankkonto kaj
informi samtempe, ke temas pri depo-
nita sumo, kiun vi rezervas por viaj
elspezoj dum la kongreso. Kompreneble
ĉiam indeku vian kongresan numeron.

26-a Universala Kongreso de Esperanto
Fredsgatan 4, Stockholm.

Polusa cirklo tranĉas Sved- landon.

La svedoj pretigis ne nur tre allogan
programon por la kongreso, sed ili an-
kaŭ preparis diversajn manierojn por el-
uzi la kongresviziton koncerne turist-
ekskursojn al treege interesaj regionoj,
al kiuj la esperantistoj ordinare ne ha-
vas eblecon veturi. Pro ekzisto de »Es-
peranta Turista Asocio«, kiu speciale
atentas la dezirojn de la esperantistoj
kaj havigas rabatojn al ili, la proponitaj

Internaciaj someraj Esperantokursoj en Stockholm

23 Julio — 2 Aŭgusto 1934.

La L.K.K. de la 26-a Universala Kongreso kaj la Sveda Esperanto-Instituto decidis komisii

d-ron F. Szilágyi L. K. (Budapest)

kies speciala instrumetodo (iniciantoj: F. Szilágyi kaj Tibor Czitrom), la t. n. lumbildmetodo vekis pro siaj moderneco kaj avantaĝoj specialan atenton, por organizi

du 10-tagaĵn kursojn

antaŭ la Kongreso (ĉiutage po 2 horoj).

La unua kurso estos *komenca kurso*, sed ĝi bonege povos servi ankaŭ por tiuj, kiuj *finis nur mallongan kurson*, kaj donos multe da okazoj por paroli (kun kaj sen lumbildoj), *la dua kurso* estos *daŭriga kaj instrukcia kurso* (por instruantoj), kaj el ties materialo ni mencias la parolekzercojn kaj metodinstruadon kun lumbildoj, la historian kaj literaturan parton, organizajn pritrakadojn ktp. Kunlaborantoj: *T. Czitrom (Budapest)*, *E. Dahl (Uddevalla)* kaj *H. Seppik (Tallinn)*.

Kurskotizo: Svedaj kronoj 10:— (aŭ egalvaloro), post la 10-a de julio 12 sv. kr. Sendu al: Poŝtĉeka konto 2012.

Malmultekostaj loĝejo, manĝado. Ekskursoj, amuzoj. Petu informojn.

SOMERAJ ESPERANTO-KURSOJ

Stockholm, Box 698.

La antaŭkongreso en Malmö estos brila festo.

La kongreso invitis longan vicon da lokaj eminentuloj por formi honoran komitaton. Inter ili troviĝas la urbestro de Malmö, la prez. kaj vicprez. de la urba konsilantaro, la episkopo de la eparĥio de Lund, supera distriktestro de la svedaj ŝtatfervojoj, ĉefrektoro de la Universitato en Lund, estro de la turista

ekskursoj estas neordinare malaltaj. Temas pri vojaĝoj al Lappland, Jemtland, Visby kaj ankaŭ trans la Baltan maron tra tri landoj. Belaj prospektoj estas eldonitaj.

asocio kaj komisaro de la Skania Foiro, vicprez. de la urba konsilantaro en Lund, la ĉefredaktoroj de la Malmöaj gazetoj, la konsuloj por Finnlando, Hungario, Rumanio, Litovio, kaj la estro de la »Parko de la Popolo».

1.8. estos instalita pompa akceptejo en la »Reĝa Atendsalono» de la ĉefstacio de Malmö. 2.8. kaj 3.8. la kongresoficejo troviĝos en la urbodomo, en kies mirinde bela festosalonego »Knutsalen» okazos la solena malfermo de la kongreso kun akcepto pere de la urbestro kaj prezidantoj de la urbkonsilantaro. Per malfermo al la kongreso de tiuj malofte disponeblaj lokoj la urbo montras sian specialan intereson kaj simpation.

La programo de la antaŭkongreso:

- 1.8. je la vesperaj horoj: La kongresanoj alvenas. Renkonto ĉe la alvenejoj. Vizito en la akceptejo, ekspedo de dokumentoj. Loĝigo.
- 2.8. je la 8.30—10.45 horoj: Vizito en la kongresejo, kie estos instalitaj poŝtejo, skribejo kaj biletekspedejo. (Estas rekomendinde, ke oni antaŭe prizorgu la monŝanĝon.)
Je la 10.45 horo: Rondveturo tra la urbo per elegantaj aŭtobusoj.
15.00 horo (akurate!). Solena malfermo de la kongreso en la urbodoma salonego »Knutsalen». Akcepto de la urbo, salutoj de la reprezentantoj. Post la solenaĵo la tuta kongreso estos fotografata kaj filmata ekster la urbodomo.
Je la 17.30 horo: Marŝo al la Parko de la Popolo. Granda festmanĝo en la Maŭra pavilono. Partoprenantoj de la festmanĝo estas petataj sin anonci. Prezo sv. kr. 4.—. Post la festmanĝo libera amuzado en la belega parko. Koncerto de la kongresa kantistaro kaj ev. esperanta teatraĵo.
- 3.8. je la 10.45 horo: Ekskurso per vagonaro (ev. speciala) al la universitata urbo Lund. Vizito en la fama katedralo kun sia legenda kripto, en la kulturhistoria muzeo ktp.
Je 16.00 horo: Reveturo al Malmö.
Je la 18.00 horo: Promeno tra la idiliaj somerĝardenoj al la Pavilono de Margareto en la Baltika Parko kaj de tie al la Kastela Parko, kie okazos liberaera propagandkunveno kun paroladoj de diversnaciaj partoprenantoj.

Se eble, vizitu la XXVI-an!

Unuafoje la universala kongreso okazos en Svedujo. Malmultaj disponas monon kaj tempon por viziti kongreson, kiam ĝi okazas eksterlande. Ordinare la esperantistoj eliras el tiuj partoj de la popolo, kiuj estas malriĉaj aŭ almenaŭ ne tiel monhavaj, ke ili povas elspezi grandan monsumon por plezura vojaĝo.

Tiu fakto estas bedaŭrinda. Ĉar dum la kunestado kun samideanoj el diversaj landoj kaj mondpartoj elkreskas la vera kaj neforigebla konvinko pri la valoro kaj signifo de Esperanto. Universala kongreso donas nepriskribeblan ĝuon kaj inspiron.

Certe ni estas konvinkitaj pri la uzebleco de nia lingvo. Ni parolas kun la samideanoj en la klubo kaj trovas Esperanton taŭga. Ni legas gazetojn kaj librojn, kiuj atestas nian konvinkon. Hazarde ni renkontas vojaĝantan eksterlandanon kaj sentas sekretan ĝojon, kiu pravigas niajn supozojn, Esperanto funkcias!

Sed la »punkto super i« estas universala kongreso. Ĝi mortigas ĉies dubojn, silentigas ĉiajn skeptikulojn kaj malfer-

Je 20.00 horo: »Adiaŭa glaso« en la restoracio de la Reĝa Parko. Koncerto.

Je 22.45 horo: Ekveturo per speciala vagonaro al la kongreso en Stockholm.

Kotizo: Sv. kr. 5.—. Por tiu sumo oni ricevas jenon: Kvitanco, kongresaj kartoj, insigno kaj programo, biletoj por veturo kun la aŭtobusoj kaj senkosta eniro al la vidindaĵoj, biletoj al la solena malfermo en la urbodomo kaj al eniro en la Parkon de la popolo. Biletoj al la vojaĝo al kaj de Lund kun partopreno en la tuta programo tie. Bela gvidlibro de Malmö, senkosta perado de tranektejo kaj multaj aliaj favoroj, ne ankoraŭ mencioblaj. — Jam nun la nombro de aliĝantoj kun ĉiu tago pligrandiĝas. Kompreneble ankaŭ vi partoprenos! Ne prokrastu aliĝi! Petu nian aliĝilon aŭ aliĝu pere de la naciaj karavanoj! Koran bonvenon!

La Loka Kongresa Komitato.

Sola adreso estas: *ESPERANTOKONGRESO, Malmö (Svedlando).*

mas niajn okulojn tiel, ke ni fariĝas klarvidantoj.

Nur tia momento, kia estas la solena malferma kunsido, kiam centoj kaj ree centoj da voĉoj, apartenantaj al trideko da diversaj nacioj, komune kantas la himnon, estas tia travivaĵo, kia plenigas la bruston ĝiseksplode per kredo kaj entuziasmo, per konvinko kaj ardo.

Mi skribis ĉisuprajn liniojn por admoni tiujn, kiuj ankoraŭ ne sin decidis, ne heziti. Mi havas spertojn kaj kuraĝas garantii, ke neniu partoprenonto sin pentos. Kaj verŝajne pasos multaj jaroj, antaŭ ol la svedaj esperantistoj denove havos la ĝojon aranĝi universalan esperantokongreson. Do, kapti la okazon! Al la elspezoj respondas valuto. *Valo.*

Dagens Nyheter

(»Tagaj Novaĵoj«), unu el la grandaj ĉefgazetoj de Stokholmo, montris al la XXVI-a Kongreso grandan komplezon. Estas interkonsite, ke dum la kongreso la gazeto ĉiutage disponigos al ĝi tutan paĝon por kongresaj pritraktoj. Krom referatoj el la kongreso, intervjuoj ktp. kun ilustraĵoj ĝi ankaŭ enhavos la plej gravajn novaĵojn de la tago, en- kaj eksterlandajn, tiuj lastaj ĉefe por la eksterlandaj gastoj. Ĉio kompreneble en Esperanto.

Ni supozas, ke tiuj svedaj esperantistoj kiuj ne havos la okazon viziti la kongreson, aĉetante la gazeton kaptos la eblon ricevi ĉiutagajn informojn pri la kongreso. Kaj klare plue, ke ĉiu kongresano havigos al si la gazeton, ĉar estas vera unikaĵo tia ampleksa kongresa raportado.

Ne malpli ol 66 personoj

el la personaro ĉe Grand Hotel (kie okazos la interkonatiĝa vespero) partoprenas en ĵus komencinta esperantokurso.

S O S

Medlemsbladet utgives nu av Radiojournal Brno. Sänd in eder krona till föreningens ordförande *Gustaf Henriks-son, Brommagatan 32, Helsingborg.*

823 ĝis 1190.*Jen novaj centoj da kongresanoj:*

823. Winifred E. Carter, instruistino, Highfield Avenue 18, Idle, Bradford, Anglujo.
824. Ada J. Green, instruistino, Field Mount, Queensbury, Bradford, Anglujo.
825. Ethel Newton, instruistino, Redburn Road 18, Shipley, Yorkshire, Anglujo.
826. Hugo Ekstrand, Ängstigen 9, Sundbyberg, Svedujo.
827. Alice Carlsson, Lindevägen 5, Enskede, Svedujo.
828. John Carlsson, ferlaboristo, Lindevägen 5, Enskede, Svedujo.
829. Ulla Carlsson, d:o, d:o.
830. Ebba Nilsson, Box 506, Höör, Svedujo.
831. J. O. Nyström, Sturegatan 2, Näs-sjö, Svedujo.
832. Jhanne Vuorinen, Hämeentie 25, Helsinki, Finnlando.
833. Kerttu Vuorinen, d:o, d:o.
834. Hilja Kronholm, instruistino, As O/Y Honkala, Viipuri, Finnlando.
835. Elin Liljeström, instruistino, Pormestarinkatu 1, Viipuri, Finnlando.
836. Inga-Brita Zackrisson, Bolagsgränd 1 A, Jönköping, Svedujo.
837. Ernst Brink, tipografo, Hallstensgatan 1, Uppsala, Svedujo.
838. Th. Nilsson, ĝardenisto, Tungelsta, Svedujo.
839. Gustav Andersson, konstrulaboristo, Marietorp, Julita, Svedujo.
840. Hugo Andersson, Box 2646, Hofors, Svedujo.
841. Gunhild Andersson, d:o, d:o.
842. Alarik Persson, Nygatan 7, Örn-sköldsvik, Svedujo.
843. O. K. Johansson, telegrafoficisto, Klockgjutaregatan 25, Sundsvall, Svedujo.
844. Ruth Johansson, Klockgjutaregatan 25, Sundsvall, Svedujo.
845. Axel Eriksson, kampkulturisto, Karlberg, Judeby, Svedujo.
846. Sirkku Koivu, studentino, Kannak-sentie 44, Viipuri, Finnlando.
847. Hannes Koivu, instruistino, Kannak-sentie 44, Viipuri, Finnlando.
848. Henry Johansson, alumetlaboristo, Villagatan 16 a, Tidaholm, Svedujo.
849. Sven Åke Nyman, laboristo, Korsgatan 1, Tidaholm, Svedujo.
850. Muriel M. Hamilton, Highburgh Road 25, Glasgow W. 2, Skotlando.
851. Jemina Downie, instruistino, Balsh-agray Avenue 84, Glasgow W. 1, Skotlando.
852. Agnes N. Maund, Chardmore Road 32, London N 22, Anglujo.
853. Hilda Blakey, Brudenell View 10, Leeds, Anglujo.
854. Harry Blakey, kasisto, d:o, d:o.
855. James F. Jackson, Green Lane N, 69, Wavertree, Liverpool, Anglujo.
856. J. Jackson, d:o, d:o.
857. Florence Alker, Higher Parr 49, St. Helens, Anglujo.
858. Richard Fazackerley, Kitchener 109, St Helens, Anglujo.
859. Edith Mc Garvie, »Lea Side», Old Field Road, Altringham, Anglujo.
860. May Hughet, Blackburn 13, Old Trafford, Manchester, Anglujo.
861. Wilhelm Härnqvist, Malmskillnads-gatan 11, Stockholm, Svedujo.
862. Ferenc Acs, ferkomercisto, Boldog-asszony tér 12, Székesfehérvár, Hungarujo.
863. M. Barber, New Road 56, Chingford, Anglujo.
864. Suzanne Gager, oficistino, Villa Stendhal 8, Paris 20a, Francujo.
865. Lars B. Sandberg, oficisto, Långgatan 12, Härnösand, Svedujo.
866. Agnes Chisholm, Stobhill Hospital, Glasgow, Skotlando.
867. Jean Howitt, Douglas street 58, Glasgow, Skotlando.
868. Hugo Fredriksson, instruisto, Alunda, Svedujo.
869. Greta Fredriksson, d:o, d:o.
870. Carl E. Ohlsson, instruisto, Birka-gatan 35, Stockholm, Svedujo.
871. Julia Ohlsson, Birkagatan 35, Stockholm, Svedujo.
872. Olga Lindholm, Norra Smedjegatan 14, Stockholm, Svedujo.
873. Sipke Stuit, instruisto, Franshals-straat 41, Huizum-Leeuwarden, Nederlando.
874. Torsten Brüde, kontoristo, Skogsborg, Arboga, Svedujo.
875. Gottfrid Lönnberg, instruisto, Sä-terbo, Arboga, Svedujo.
876. Ellen Berggren, komizino, Ekhult, Arboga, Svedujo.
877. Signild Lönnberg, d:o, d:o.
878. Elsa Weijser, instruistino, Sirisberg 2, Lidingö 1, Svedujo.
879. Tibor Czitrom, Soroksári ut 8, Bu-dapest, Hungarujo.
880. Emy Lindmark, Ulleråkers Sjukhus, Upsala, Svedujo.

881. Karin Söderman, d:o d:o.
882. Wilh. Johansson, kontoristo, Villa Mi, Stenkyrkegat. 8, Malmö, Svedujo.
883. Norman N. Forbes, studanto, Oakdale Road 39, Liverpol, Anglujo.
884. Bruno Gahler, Talstrasse 3/III, Gablonz an der Neisse, Ĉeĥoslovakujo.
885. K. F. Lindqvist, Fabriksgat. 4, Nybro, Svedujo.
886. Karin Lindqvist, d:o d:o.
887. Emilie Chautard, domadministranto, de Fontainebleau 3, Athis, Mons, Seine et Oise, Francujo.
888. Marcel Chautard, d:o d:o.
889. Blanche Pacquez-Bacrot, de la Tannerie 13, Calais, Francujo.
890. Gustave Pacquez, Direktoro, d:o.
891. Henri Clause, kolegiestro, Leveux 13, Calais, Francujo.
892. Jeanne Clause, d:o d:o.
893. Petrus Fredlund, Örbyhus, Svedujo.
894. Frantisek Heikenwälder, librotenisito, Vrchlického 18, Prostejov, Ĉeĥoslovakujo.
895. Stig Carlson, fabriklaboristo, Tallgården, Kvicksund, Svedujo.
896. Clara Holmgren, instruistino, Box 588, Höör, Svedujo.
897. Hilma Nyman, Järnvägsgat., Höör, Svedujo.
898. Carl Hallros, ĝardenisto, Bispmotalla Handelsträdgård, Motala, Svedujo.
899. Dora Andersson, instruistino, Gustav Adolfsgatan 17, Linköping, Svedujo.
900. Tage Widén, ŝoforo, Stavby, Upplands-Tuna, Svedujo.
901. John Hedberg, Box 65, Bredbyn, Svedujo.
902. Berta Olsson, poŝtoficistino, Skönsberg, Sundsvall, Svedujo.
903. Olle Jansson, Vattholma, Svedujo.
904. Paul Jacobsson, instruisto, Fabriksgatan 17, Växjö, Svedujo.
905. Sune Eldh, laboristo, Vattholma, Svedujo.
906. Erik Andersson, pentristmajstro, Kungsgatan 31, Malmö, Svedujo.
907. Ellen Andersson, Kungsgatan 31, Malmö, Svedujo.
908. Gunnar Gustavsson, ŝoforo, Saltsjövägen 14, Halmstad, Svedujo.
909. Valter Segersten, tranĉisto, Lindbacka, Örebro, Svedujo.
910. Gunnar Björck, tranĉisto, Gamla Gatan 17, Örebro, Svedujo.
911. O. H. Lantz, tornisto, Nygatan 65, Örebro, Svedujo.
912. Nils Colding, kontrolanto, Elverket, Södertälje, Svedujo.
913. Erik Grahn, Algatan 23, Södertälje, Svedujo.
914. Ragnhild Ahl, Ragnhildsgatan 17, Södertälje, Svedujo.
915. Ebba Dahlquist, instruistino, Kungsgatan 4 B, Malmö, Svedujo.
916. Gertrud Dahlquist, d:o d:o.
917. Erik Närman, Sundby gård, Bromsten, Svedujo.
918. Cicely Leadley-Brown, advokato, Cook street 8, Liverpool 2, Anglujo.
919. Emilie Suchardová-Wildmann, oficistino, Novovysocanská 695, Praha IX, Ĉeĥoslovakio.
920. Agnes Melchior, instruistino, Blindinstitut, Kalundborg, Danujo.
921. Poul Møller, farmaciisto, »Nybo», Sdr Møllevej, Grenaa, Danujo.
922. Louise Blicher, Bredgade 63 A, København, Danujo.
923. Gustav Henriksson, kontoristo, Brommagatan 32, Hälsingborg, Svedujo.
924. Oskar Frode, instruisto, Hedlundsgatan 2—4, Göteborg, Svedujo.
925. Karin Pettersson, vendistino, Slotsgatan 127, Norrköping, Svedujo.
926. N. Bagge, instruisto, Danmarksgade 28, Randers, Danujo.
927. A. Bagge, Danmarksgade 28, Randers, Danujo.
928. Tage Nielsen, d:o d:o.
929. Gudrun Bredgaard, d:o d:o.
930. N. A. Isaksson, poŝtstacia estro, Hishult, Svedujo.
931. Th. M. A. Simonis, instruistino, Broersvest 99, Schiedam, Nederlando.
932. J. Klip, Rotterdamsche Dijk 44-B, Schiedam, Nederlando.
933. P. J. Sannen, Stationsstraat 77, Boxtel, Nederlando.
934. P. J. Vermaas, arkitekto, N. Binnenweg 340, Rotterdam, Nederlando.
935. I-J. L. Vermaas-Rensen, d:o d:o.
936. M. H. Vermaas, d:o d:o.
937. Ramon Cabeza, instruisto, »Hotel Victoria», Cades de Montbui, Barcelona, Hispanujo.
938. Margaretha Moora, profesorino, van Boetzelaerlaan 127, 's Gravenhage, Nederlando.
939. Adriana Jonquière, profesorino, Jeplaan 59, 's Gravenhage, Nederlando.
940. J. M. van Meegeren, institutestro, postbus 81, Venlo, Nederlando.

941. H. M. Mulder, Mr. P N Arntzeniusweg 3-boven, Amsterdam O, Nederlando.
942. J. Mension, inĝeniero, Jasanstraat 30, Amsterdam, Nederlando.
943. J. C. M. Mension-de Logie, Jasanstraat 30, Amsterdam, Nederlando.
944. J. P. van Dijk, ŝtata oficisto, Hooi-drift 98—B, Rotterdam, Nederlando.
945. J. A. F. van Dijk, d:o d:o.
946. J. W. Huiskes, Tuinlaan 56-C, Schiedam, Nederlando.
947. Adriana Middelkoop, Jonkerweg 11, Hilversum, Nederlando.
946. Elisabeth Brinck, telefonistino, Valkenboschkade 110, 's Gravenhage, Nederlando.
949. Gertruida M. Brinck, ŝtata oficistino, Valkenboschkade 110, 's Gravenhage, Nederlando.
950. Johanna H. Schouten, telefonistino, Amalia van Solmsstraat 137, 's Gravenhage, Nederlando.
951. A. H. W. van Zeyl, Rijnkade 94, Arnhem, Nederlando.
952. A. G. Zellenrath, instruistino, Rimmelndstraat 4, Goes, Nederlando.
953. N. J. Sannen, Stationsstraat 77, Boxtel, Nederlando
954. G. Jongbloed, Huygenslaan 70, Arnhem, Nederlando.
955. Elizebeth Popping, Oosterwolde, Nederlando.
956. Geesje Stedehouder, instruistino, Verlengde Dracht 45 c, Heerenveen, Nederlando.
957. E. M. van Gelder, ŝtata oficistino, Laan van Meerdervoort 94, 's Gravenhage, Nederlando.
958. G. H. H. van Zeyl jr, ĵurnalisto, Willemsplein 12, Arnhem, Nederlando.
959. J. R. G. Isbrücker, inĝeniero, Oostduinlaan 32, 's Gravenhage, Nederlando.
960. Ellen Isbrücker, d:o d:o.
961. I. M. H. Boon, Brederoosche Weg B-55, Santpoort-Station, Nederlando.
962. C. Th. M. Boon, d:o d:o.
963. A. Woudstra, Gijsbert Japickstraat 8, Leeuwarden, Nederlando.
964. A. Kuiper, Over de Kelders 2, Leeuwarden, Nederlando.
965. M. van der Meulen, Schoppershofstraat 17, Leeuwarden, Nederlando.
966. P. Hendriks, instruisto, Verstolkstraat 7, Leeuwarden, Nederlando.
967. O. E. Houtsma, kuracisto, Deventer, Nederlando.
968. Sinjorino Houtsma, Deventer, Nederlando.
969. Sj. Feenstra, instruistino, Oranjestraat 29, Assen-Dr, Nederlando.
970. W. Braam, Oranjestraat 39, Assen, Nederlando.
971. W. de Vries, instruistino, Vaart N. Z, Assen, Nederlando.
972. G. Pol, instruistino, d.o d.o.
973. S. F. A. Perdok, Iepenlaan 7, Assen, Nederlando.
974. Ida Lindqvist, Sanatoriet, Upplands Väsby, Svedujo.
975. Gunhild Berg, oficistino, Lundagatan 44 uppg. 5 a, Stockholm, Svedujo.
976. C. A. Carlberg, Fredsgatan 21, Sundbyberg, Svedujo.
977. Arvid Johansson, pentristo, Dalängsgatan 3, Lidköping, Svedujo.
978. Albin Wolker, Långhed, Alfta, Svedujo.
979. Jacob Jacobsson, ŝoforo, Levar, Nordmaling, Svedujo.
980. Maja Olsson, Eriksgatan 9, Höör, Svedujo.
981. Leono Funken, Hominnenstrasse 24, Koblenz-O, Germanujo.
982. Tonjo Funken, d:o d:o.
983. Marta Lindner, Bibrastrasse 7, Würzburg, Germanujo.
984. Flora Lörtscher, Eckstein, Herisau, Svisujo.
985. Martha Schmid, Eggstrasse 718, Herisau, Svisujo.
986. Frieda Welter, telefonistino, Herisau, Svisujo.
987. Emil Zuberbühler, Spittel 415, Herisau, Svisujo.
988. Hjalmar Jakobsson, fervojisto, Kv 121 T 6, Kiruna, Svedujo.
989. Lilly Jakobsson, Kv 121 T 6, Kiruna, Svedujo.
990. Kärstin Jakobsson, d:o d:o.
991. Isa Watson, instruistino, Lefroy st 24, Coatbridge, Skotlando.
992. Hugo Salokannel, Salminen, Finnlando.
993. Sinjorino Salokannel, Salminen, Finnlando.
994. Ture E. Johansson, 70-4, Kiruna, Svedujo.
995. Nils Enfors, instruisto, Grunnebo, Svedujo.
996. Ragnar Westrin, Böle, Gnarp, Svedujo.
997. Frances W. M. MacAuslan, Boreham Road 13, London N. 22, Anglujo.

998. E. Wheatley, Wolverhampton Road 57, Hagley Road West, Birmingham, Anglujo.
999. Doreen Bottom, industristino, Central Drive 67, Shirebrook, Nr Mansfield, Anglujo.
1000. J. B. Primmer, Benvrackie, Cowdenbeath, Skotlando.
1001. L. Richardson, Osborne Gardens 9, Monkseaton, Whitley Bay, Anglujo.
1002. A. R. Fairbairn, Burnaby Lodge, Ryton-on-Tyne, Anglujo.
1003. S. Barnard, Albert Road 88, London E. 17, Anglujo.
1004. G. H. Moxon, Sandleigh Road 43, Leigh-on-Sea, Anglujo.
1005. E. F. Paraige, Woronzow Road 10, London N.W.8, Anglujo.
1006. C. Ellison, Elm Road 27, Bournville, Birmingham, Anglujo.
1007. Elizabeth Ashby, Selly Park Road 118, Selly Park, Birmingham, Anglujo.
1008. H. H. Meek, Linton Road 14, Hastings, Anglujo.
1009. A. Meek, d:o d:o.
1010. Charles Barnes, Athelstan Road 39, Colchester, Anglujo.
1011. Niels Moesgaard, bibliotekisto, Jernbanegade 10, Sønderborg, Danujo.
1012. Gösta Olsson, kontoristo, Skönsberg, Sundsvall, Svedujo.
1013. J. Aafjes, Rochussenstraat 393-a, Rotterdam, Nederlando.
1014. S. D. Mannoury, Amstelveensche weg 56-I, Amsterdam, Nederlando.
1015. Elsje Mannoury, d:o d:o.
1016. G. L. Oosterhoff, instruistino, Engelumstraat 11, Leeuwarden, Nederlando.
1017. W. van der Meer, instruistino, Marsumerstraat 10, Leeuwarden, Nederlando.
1018. A. Algra, instruistino, Fonteinstraat 37, Leeuwarden, Nederlando.
1019. G. Weijdijk, instruistino, Buitenpost, Nederlando.
1020. C. Hermes-Snel, Pension St. Jozef, Poeldijk, Nederlando.
1021. Hanna Lehnen, Paulys Buysstraat 49, 's Gravenhage, Nederlando.
1022. J. v. d. Snoek, Vondellan 29, Amersfoort, Nederlando.
1023. H. Soeteman-Rube, Copernicusstraat 110, 's Gravenhage, Nederlando.
1024. L. Den Hollander, instruistino, Pontanuslaan 52, Arnhem, Nederlando.
1025. A. Heyssen, Schelpenkade 39, Leiden, Nederlando.
1026. Elfride Kangur, instruistino, Pikk 102, Nõmme, Estonio.
1027. Harald Kadak, laboristo, Vuremi 20-2, Tallinn, Estonio.
1028. Edgar Raudsepp, instruisto, Mere-mäe, Estonio.
1029. Magda Lindeberg, instruistino, Hanikase algk. Orava, Estonio.
1030. Elisabet Lübek, instruistino, Kopli 78-30, Tallinn, Estonio.
1031. Linda Rääsk, oficistino, Vabriku 8a 3, Tallinn, Estonio.
1032. Olga Kiviselg, muzikistino, S Sepa 3, Pärnu, Estonio.
1033. Benita Lauristin, instruistino, Söörensi 4-1, Tallinn, Estonio.
1034. Jaan Kurn, instruisto, Viru-Maidla p. ag, Estonio.
1035. Astrid Ericson, Humlegårdsgatan 23, Stockholm, Svedujo.
1036. Astrid Nilsson, Amiralitetsgat. 19, Göteborg, Svedujo.
1037. Nils Pettersson, tipografisto, Klarborgsgatan 28, Göteborg, Svedujo.
1038. Richard Unger, tipografisto, Kämpegatan 16, Göteborg, Svedujo.
1039. Fredrik Fernström, fervojisto, Jungmansgatan 7, Göteborg, Svedujo.
1040. Yvonne Petit, bankoficistino, Rue de Neuilly 59, Rosny sous Bois, Francujo.
1041. Adolf Larson, Drömstigen 43, Äppelviken, Svedujo.
1042. Elio Migliorini, redaktoro, Via Alessandro Poerio 33, Roma 144, Italio.
1043. Bruno Migliorini, profesoro, Hotel de Rome, Fribourg, Svisujo.
1044. Ilse Marquardt, Karrenwall 1a, Danzig.
1045. Representanto de Danziga Esperanto-Asocio, Karrenwall 1a, Danzig.
1046. Ernst H. Rudin, kontorĉefo, Ulrichhamn, Svedujo.
1047. Rudolf Pawlik, fervojisto, Stubalpenstrasse 33, Knittelfeld, Austrio.
1048. Jakob Heinkellner, fervojisto, Bahnstrasse 22, Knittelfeld, Austrio.
1049. Nando Messina, inĝeniero, Via Raggio Emilia 16, Roma, Italio.
1050. M. H. Wagtendonk, industriistino, Wijngaardstraat 3, Goes, Nederlando.
1051. F. J. Eldering, Roelof Hartplein, Nieuwe huis 4, Amsterdam, Nederlando.

1052. M. A. Goedhart, Wassenaarstraat 17, Bergen op Zoom, Nederlando.
1053. T. Beetsma, flegistino, Langeswaag, Nederlando.
1054. W. Arnold, ĉefinstruisto, Werdau, Sachsen, Germanujo.
1055. Sinjorino Arnold, d:o d:o.
1056. E. K. Aspenström, Österå, Falun, Svedujo.
1057. Sinjorino Aspenström, d:o d:o.
1058. Arvid Persson, Box 5, Vika st., Svedujo.
1059. Johanna Larsson, instruistino, Vika st, Svedujo.
1060. Karl Körschenhausen, Babelbergerstrasse 9, Berlin-Wilmersdorf, Germanujo.
1061. Eskil Håkansson, inĝeniero, Ursvik, Ulriksdal, Svedujo.
1062. Majken Cederqvist, Jungmansgatan 14, Göteborg, Svedujo.
1063. Elsa Johansson, Karl Gustafsgatan 36, Göteborg, Svedujo.
1064. Svea Johansson, d:o d:o.
1065. E. Basddvin, Smith High, St Barry, Anglujo.
1066. Astrid Anthonisen, Hop st. Bergen, Norvegio.
1037. Ingeborg Härnqvist, Malmskillnadsgatan 11, Stockholm, Svedujo.
1068. Stanislav Kamaryt, profesoro, Zochova 3, Bratislava, Ĉeĥoslovakio.
1069. Josef Fousek, advokato, Prelonc, Ĉeĥoslovakio.
1070. Sinjorino Fouskova, Prelouc, Ĉeĥoslovakio.
1071. Herbert L. Thompson, Box 2471, Honolulu, Hawaii, Usono.
1072. Majken Mårtensson, kontoristino, Tullgatan, Ystad, Svedujo.
1073. Paul Kempeneers, kuracisto, Avenue Montjoie 19, Uccle 3, Belgujo.
1074. Diny Kempeneers, d:o d:o.
1075. E. J. Gunthers, instruistino, Vrielinckslaan 19, Almelo, Nederlando.
1076. A. Wartena, d:o d:o.
1077. Gerhard Johansson, Statens Järnvägar, Värtan, Svedujo.
1078. Jenny Johansson, d:o d:o.
1079. Elin Lundman, instruistino, Box 6680, Borlänge, Svedujo.
1080. Isabella Buchanan, skribmaŝinistino, Craiglea Drive 4, Edinburgh, Skotlando.
1081. Ignacy Dziedzic, advokato, Szeroka 43, Torun, Polujo.
1082. Marja Dziedzicova, d:o d:o.
1083. Sven Sköldberg, serĝento, Borås, Svedujo.
1084. Bruno Frölich, Karl Peters-platz 2, Hannover, Germanujo.
1085. Elis Larsson, Källgatan 16, Eskilstuna, Svedujo.
1086. Britta Larsson, d:o d:o.
1087. Frieda Boettcher, Marcus 37, Berlin O 27, Germanujo.
1088. Gösta Bryngelsson, korbfaristo, Box 705, Tierp, Svedujo.
1089. Olle Lindgren, komercisto, St Annegatan 15, Nyköping, Svedujo.
1090. Artur Hoff, brosfaristo, Tosterup, Svenstorp, Svedujo.
1091. Wallace, komercisto, Newcastle-on-Tyne, Anglujo.
1092. Lionel, korbfaristo, d:o d:o.
1093. Jan Silhan, kapitano, Radziechow, Lwow, Polujo.
1094. Margit Silhan, d:o d:o.
1095. Ernest Ragon, komerca oficisto, Avenue Sidi-Brahim, »Les Clématites, Grasse, Francujo.
1096. Henriette Rosdorff, Mr van Coothstraat 54, Waalwijk, Nederlando.
1097. C. M. van Deventer, Resedastraat 6, 's Gravenhage, Nederlando.
1098. A. G. Diephuis, Vermeerlaan 1, Hilversum, Nederlando.
1099. A. Diephuis, Sloetstraat 2, Nijmegen, Nederlando.
1100. J. van der Marel, inĝeniero, Zuidzijde 1, Bodegraven, Nederlando.
1101. Tiny Weyer, De Steeg, Nederlando.
1102. Lucy Weyer, d:o d:o.
1103. Herman Enblom, Marnäs, Enviken, Svedujo.
1104. Marie Andersen, instruistino, Erslev skole, Erslev, Danujo.
1105. Helfrid Lindkvist, instruistino, Saltsjö-Järla, Svedujo.
1106. Helmi Lindkvist, instruistino, d:o.
1107. Isobel Cochvane, instruistino, Venturefair Avenue, Dumfermline, Skotlando.
1108. Agnes Breck, Dundas street 22, Edinburgh, Skotlando.
1109. Erik Videgren, Kommendörsgatan 17, Stockholm, Svedujo.
1110. Ernst Retsler, kand. jur., Majorsgatan 12, Stockholm, Svedujo.
1111. Hilding Olson, agordisto, Jungmansgatan 14, Göteborg, Svedujo.
1112. Hanna Nilsson, Trädgårdsgatan 20, Mölndal, Svedujo.
1113. Seth Lönnegren, mag. fil., Frejgatan 13, Stockholm, Svedujo.
1114. Verner Ljunggren, korbfaristo, Majorsgatan 10, Stockholm, Svedujo.

1115. Thomas P. Munk, terkulturisto, Vestervig, Danujo.
1116. Ilmi Walli, vendistino, Castrevink 10 B, Helsinki, Finnlando.
1117. Ida M. Tulkki, Pontuksenkatu 36 B. 9, Viipuri, Finnlando.
1118. Folke Andersson, laboristo, Klippan, Kvicksund, Svedujo.
1119. A. C. Heukeshoven, Kremerstraat 4, Bergen op Zoom, Nederlando.
1120. C. P. Beyer, instruistino, Aelbrechtskade 157-B, Rotterdam, Nederlando.
1121. M. P. Vergroesen, Zuivelstraat 31-A, Bergen po Zoom, Nederlando.
1122. L. Ouwehand, komercisto, Bergschelaan 165-A, Rotterdam, Nederlando.
1123. Marit Habberstad, instruistino, Kløfta, Norvegio.
1124. Marianne König, kontoristino, Langestrasse, »Eigener Herd«, Reichenberg, Ĉeĥoslovakio.
1125. Jane Shand, instruistino, Rossend Castle, Burntisland, Skotlando.
1126. Euphemia Anderson, instruistino, d:o d:o.
1127. Odo Bujwid, profesoro, Lubicz 34, Krakow, Polujo.
1128. Luise Frost, prokuristino, Artura Grottgera 7 m 2, Bydgoszcz, Polujo.
1129. W. E. Collinson, profesoro, Bertram road 9, Sefton Park, Liverpoolo, Anglujo.
1130. Jeannie Cook, Ladykirk Road 178, Newcastle on Tyne, Anglujo.
1131. Barbara G. Peters, flegistino, Pembroke Sq., Bayswater 22, London W 2, Anglujo.
1132. R. G. Fraser, Balfour Road 37, Ilford, Anglujo.
1133. G. Moore, Cleveland Square 32, London W. 2, Anglujo.
1134. Herbert Sewell, presisto, The Wellings, Southwall Road, Deal, Anglujo.
1135. Sándor Eitner, agronomo, Salomvár, Zala, Hungarujo.
1136. H. F. Haalebos, sekretariino, Haven 7, Leiden, Nederlando.
1138. Erik Göransson, Orsa, Svedujo.
1139. Hans Jakob, Direktoro de U.E.A., Tour de l' Ile, Genève, Svisujo.
1140. Johannes Karsch, oficejestro, Dresdenerstrasse 60, Lausa-Weixdorf, Germanujo.
1140. George Binks, komizo, Moore 17, Burnley, Anglujo.
1141. Dorothy Burgess, kudristino, Church 23, Harle syke, Bunley, Anglujo.
1142. Agnes Hogg, instruistino, Bradford street 25, Chester, Anglujo.
1143. George H. Bentham, desegnisto, Green drive 5, Penworthan Hill, Preston, Anglujo.
1144. Sigmund Ökland, studento, Rommetveit, Stord, Norvegio.
1145. Nils Ökland, instruisto, d:o d:o.
1146. Bodvar Barnsnes, studento, d:o d:o.
1147. Johannes Sandven, studento, d:o.
1148. Josef Waldmann, fervojisto, Berghauserstrasse 349, Recklinghausen, Germanio.
1149. Alf Arnesen, prezidanto de »Norges Blindforbund«, Jessnes, Norvegio.
1150. Karlo Adamek, lernejestro, Zablati, Ĉeĥoslovakio.
1151. C. Hilmer Johansson, redaktoro, St Olovsgatan 15, Falköping, Svedujo.
1152. Elisabeth Johansson, d:o d:o.
1153. Joel Elfström, Garvaregatan 7, Falun, Svedujo.
1154. A. Waterlander, lernejestro, Oranjewoud, Nederlando.
1155. M. Gouverneur, Zuivelstraat 47, Bergen op Zoom, Nederlando.
1156. M. Jonker, Betaalkantoor, Broek op Langedijk, Nederlando.
1157. E. Bossen, instruistino, Dorpstraat, Oud-Karspel, Nederlando.
1158. Tj. Stienstra, instruistino, Lindelaan 1, Herenveen, Nederlando.
1159. G. H. Benink, instruistino, Molenkamppark, Almelo, Nederlando.
1160. Edmond Pomérol, Escudier 3 bis, Boulogne-Billancourt, Francujo.
1161. Johannes Schröder, Hammarschmidtstrasse 28, Krefeld, Germanio.
1162. Simone Decaudin, Fauborg Baudimont, Arras, Francujo.
1163. Gudrun Bach, Schmidtstr 1, Trondheim, Norvegio.
1164. Kaarlo Haartman-Harteva, inĝeniero, Väinämöisenkatu 27, Helsinki, Finnlando.
1165. Elsa Nordkvist, Nyborg, Kalix, Svedujo.
1166. Elizabeth Inglis, Dalkeith Road 42, Edinburgh, Skotlando.
1167. Thomas V. Inglis, instruisto, d:o.
1168. E. A. Olsson, brosfaristo, Strand 5, Alingsås, Svedujo.
1169. V. A. Johansson, inspektoro, Carl Johansgatan 34, Göteborg, Svedujo.

1170. Anders Hansson, komercisto, Carl Gustavsgatan 34, Göteborg, Svedujo.
1171. Nils Juringius, fil. doktoro, Majorsgatan 10, Stockholm, Svedujo.
1172. Anna Juringius, d:o d:o.
1173. Greta Juringius, maŝinskribistino, Majorsgatan 10, Stockholm, Svedujo.
1174. Axel Larsson, kontoristo, Hamre, Näsvisken, Svedujo.
1175. Elli Holmin, Skärsta, Hallstavik, Svedujo.
1176. Alfred Lindkvist, instruisto, Näsvisken, Svedujo.
1177. Sara Häggström, Nordanås, Sidsensjö, Svedujo.
1178. Thora Franzon, Majorsgatan 12, Stockholm, Svedujo.
1179. Elin Hammar, oficistino, Stureparken 5, Stockholm, Svedujo.
1180. Annette Olsson, Kl. Ö. Kyrkogata 3, Stockholm, Svedujo.
1181. Anton Nilsson, Klarabergsvägen 29 B, Stockholm, Svedujo.
1182. Hans Andersson, Hornsgatan 52, Stockholm, Svedujo.
1183. Nils Nilsson, Surbrunnsgatan 4, Stockholm, Svedujo.
1184. Terese Nordin, Kl. V. Kyrkogata 20, Stockholm, Svedujo.
1185. Erik Meijer, Roslagsgatan 54, Stockholm, Svedujo.
1186. Nanny Meijer, oficistino, Roslagsgatan 54, Stockholm, Svedujo.
1187. Gillis Staberg, esperantoinstruisto, Skara, Svedujo.
1188. Siegfried Bachmann, teĥnikisto, Stösser, Conradshöhe bei Berlin-Tegel, Germanujo.
1189. Paŭlo Trombik, fervojisto, Skrecon, Bohumin, Ĉeĥoslovakio.
1190. G. Almgren, Västervik, Svedujo.

Laŭlande: Alĝerujo 3, Anglujo 107, Aŭstrujo 2, Belgujo 11, Ĉeĥoslovakujo 17, Danujo 44, Danzig 3, Egiptujo 1, Estonio 73, Finnlando 19, Francujo 57, Germanujo 65, Hindujo 1, Hungarujo 4, Hispanujo 7, Italujo 14, Latvio 2, Nederlando 129, Norvegio 32, Polujo 9, Saarteritorio 5, Skotlando 39, Svedujo 534, Svisujo 8, Usono 1 =1190.

— ★ —

Marionetoj.

De Bo Bergman.

*Jen sidas sinjor' en ĉiela hal',
al liaj kadukaj manoj
fadenoj iras en densa ar'
de ĉiuj liaj teranoj.*

*Kolektas li ĉiujn, je lia ektir'
ni gestas kaj dancas laŭ lia dezir'
amuze nin movas en piruetoj,
ni etaj marionetoj.*

*Ni manĝas kaj trinkas, post am' kaj batal',
ni mortas kaj kuŝas entombe.*

*Ni portas la torĉon de brila pensar',
kaj vortojn ni uzas aplombe.*

*Ni vivas en gloro, en peka mizer',
sed ĉio pereanta kaj ĉiu prosper'
kaj antaŭsignoj de ĝoj' kaj malbenoj
estas nur manipul' per fadenoj.*

*Maljuna sinjor' en ĉiela hal',
kiam vi iĝos dormema?*

*La danco en via pupkarnaval'
ja ĉiam estas samtama.*

*Ektir' per faden' — kaj tuj post moment'
ripozos trankvile la homa gent',
kaj dormos kviete malic' kaj doloro
en via granda ludilskatolo.*

El la aperonta Sveda Antologio.

Trad. Stellan Engholm.

— ★ —

Centoj da esperantistoj

jam nun povas akiri la diplomon pri supera ekzameno, diris parolanto en Södertelje. Sed ili timas, ke ili scias ne sufiĉe. Precipe pri la movado. Facile ni konstatos, ĉu vi estas preta. Sendu esperante skribitan leteron, en kiu vi rakontas pri viaj studoj ktp. Traduku 20 liniojn el gazeta aŭ alia rakonto, kaj ni respondos per prijuĝo kaj konsilo, kiel vi kompletigu viajn sciojn. Ni sendos tiajn demandojn, kiujn vi devas povi respondi, pri la movado. Ni devas en tiu ĉi kongresa jaro altigi la nombron de tiuj, kiuj akiris la diplomon, ĉar nun ĝi tute ne montras la staton de nia sveda movado! Sendu vian leteron al Sv. Esp. Institutet, Skogen 23, Lidingö I.

— ★ —

Brava esperantoheroo mortis.*Anders Andersson.*

La 13-an de majo mortis la plej maljuna esperantisto de Malmö, samideano *Anders Andersson*, post longa malsano. Li naskiĝis la 24-an de junio 1857, sed nur malfrue, nome je 65-jara aĝo, eklernis Esperanton. Sed li fariĝis vera samideano. Per sia granda amo al la Zamenhofa afero lia tuta estaĵo radiis de homamo, frateco kaj espero. Belan kaj neforgeseblan pruvon pri tio li montris per sia kreo de majstre farita Zamenhofbusto, kiun spite la 71 jarojn kaj skuantajn manojn li sukcesis donaci al Klubo Esperantista de Malmö, kies honora membro li estis. Laŭ propra eldiro la tago de la inaŭguro 1928 estis lia plej granda dum la vivo.

La enterigo okazis la 21-an de majo, kaj la esperantistoj multnombre akompanis sian pioniron en la lasta vojaĝo. Ili ankaŭ per florgarboj, standardo kaj lastaj salutoj honorigis tiun falintan heroon. Ke li ripozu en paco! *E.A.*

Grava perdo por Örebro Esperanto-Societo.

Ture Olsson mortis la 22-an de aprilo en sia hejmo en Örebro, atinginte nur la aĝon de 29 jaroj. La solena enterigo okazis sabate la 28-an de aprilo en la krematorio de Örebro, kie li poste kre-

SVEDA KRONIKO

ARBOGA. 12. 5 okazis nia esperanta finfesto. Instruisto Syske Stuit el Holando ricevis memorajon. *B-m.*

HERRLJUNGA. 23.4 fondiĝis la esperantoklubo »La Verda Stelo». Estraro estas: Orvar Dahlgren, prez.; Einar Nilsson, vicprez. kaj studgvidanto; Arthur Hall, sekr.; Bertil Hall, vicprez.; Kurt Borg, kas. Oni decidis aliĝi al S.E.F. *Perlo.*

HOFORS. Post Esperantokurso fondiĝis 2.5. la klubo »La tagiĝo». Kiel estraro oni elektis la jenajn: prez. Hugo Andersson; vicprez. Viktor Strand; sekr. Olof Holmberg; vicsekr. Gösta Hammarberg; kas. Gösta Rydelius.

matoriĝis. Multaj floroj kaj florkronoj estis dediĉataj al la mortinto.

Ture Olsson estis unu el la plej konataj kaj lertaj esperantistoj en Örebro, kaj la perdo por Örebro Esperanto-Societo estas granda kaj dolora. Li multe laboris por ĝi kaj por la distrikto. El nia rondo foriris kamarado, kiun ni ĉiam memoros kiel vera esperantisto. La funebro estas peza. Dormu li en paco.

Ni kore kondolencas la familion.

G. B.

*Ture Olsson.*



Antaŭkongresa propaganja vespero en Malmö.

HÖGANÄS. 14.4. okazis kvaronjara kunveno. La klubo decidis admoni al siaj membroj proponi Esperanton ĉiu en sia organizo.

KINNARED. 29.5 la esperanta studrondo de Kinnared decidis fondi klubon. Estraro estas: Oskar Spetz, prez.; Greta Svensson, sekr.; Rut Andersson, vicprez.; Eric Rydberg, kas. La kasisto ankaŭ funkcias kiel bibliotekisto kaj reprezentanto de Eldona Societo Esperanto.

Kasisto.

KUMLA. 16.4 por la programo respondis ĉiuj samideaninoj de la klubo kaj, verdire, ili sin montris veraj aktorinoj profesiaj. Ili prezentis skeĉojn, dialogojn kaj kantojn. — 12.5. Por la unua fojo flirtis super nia komunumo la verdkolora flago, ĉi-tio kaŭze de kvaronjar-kunveno. La amuza parto de la programo ampleksis i.a. ĥorkantadon kaj teatraĵon.

Torento.

KVICKSUND. 21.4. kursfina festo. Ĉeestis ges-anoj el Eskilstuna, Torshälla, Arboga, Örebro kaj Hallstahammar. S-ro Stuit el Holando paroladis pri esperanto kaj la paco. Sekvis muziko, kantado, deklamado ktp. Bedaŭrinde la fervora kursgvidinto, s-ro Holger Ekblad, ne havis eblon ĉeesti, ĉar li estas malsana. Li pasigis kelkajn semajnojn en malsanulejo por saniĝi. Dum la pasinta vintro li fervore kaj obstine gvidis 4-on da kursoj samtempe, kvankam li pro malsano kelkfoje lamiris al la studkunvenoj. Honoron al li!

Guĉjo.

LINKÖPING. Societo Esperanto jarkunvenis. Koncerne aliĝon al tutlanda federacio la jarkunveno decidis ĝispluan prokraston. Anstataŭe estos elektataj perantoj por ambaŭ ekzistantaj federacioj. La nova estraro: T. Frithiofson, prez.; B. Sjögren, sekr.; H. Kernell, kas.; H. Nilsson, Svea Åström, Margit Johansson kaj B. Samuelsson.

LUND. 5.5. la Esperanto-Klubo havis bonegan feston en Industriestauranten. I. a. klubanoj ludis teatraĵon »Kongresintervenajo». Belegajn tukon kaj kusenon la sinjorinoj dislotis. (Por la ricevita mono la s-inoj intencas havigi grandan standardon al la klubo.) Sekvis dancado, interrompita de gajaĵkantoj ktp.

El Lo.



La Esperantoklubo de Östervåla.



La Esperantoklubo de Valskog.

MALMÖ. Klubo Esperantista de Malmö: 26.5. Kombinita kursfiniĝa kaj antaŭkongresa propagandvespero kun riĉa, varia programo, konsistanta el paroladoj, muziko, deklamo, kanto kaj teatraĵoj en sveda kaj esperanta lingvoj. Speciale aŭskult- kaj vidinda estis esperanta teatraĵo, bonege prezentata de gesamideanoj el Lund. *Partopreninto.*

— La socialdemokrata esperantoklubo aranĝis festenon 28.4. kaŭze de la finiĝo de la vintra kurslaboro. Okazis paroladoj, revua kantado kaj teatraĵo ama-

tora. Oni ankaŭ ne forgesis la komunan kantadon kaj havis letervesperon.

1 majo la klubo grandamase partoprenis en la demonstracio. *E. A.*

SUNDSVALL. »Esperantotago» okazis 13.5. kun partopreno de 100-o da esperantistoj el 3 provincoj: Medelpad, Ångermanland kaj Helsingland. Bona programo: parolado de C. W. Sjögren, kantado, muziko, amatora teatro ktp.

VALDEMARSVIK. 14.3. Diskutado: Kiel aranĝi la aŭtunajn kursojn? 26.3.



Esperantokurso en Visby. Gvidis E. Ch. Schuldenfrei.



La geaktoroj en Kumla.

Poŝtkartvespero kune kun la nova kurso. 10.4. Laŭtlegado, kantado ktp. 2.5. Decidis la klubo fondi konversacian rondon someran. *F-ulo.*

VALSKOG. Dum la printempo estis komenca kurso en Valskog. La 30-on da partoprenantoj gvidis S. Stuit el Holando. 25.4. fondiĝis esperanta klubo. La estraro estas: Prez. s-ro Eriksson, vicprez. s-ro Norling; sekr. fr-ino Skarstedt kaj kas. fr-ino Zandrén. *B-m.*

Mycket ofta händer det

att förfrågningar inkomma angående esperantos användbarhet i svenska hotell, restauranger, affärer o.s.v. Det är utländska turistande esperantister som fråga.

Nästan aldrig kunna upplysningar lämnas.

Därför be vi er nu tillskriva oss och ge oss alla de namn och adresser på hotell, restauranger, affärer, banker, resebyråer, tullstationer o.s.v., där esperanto talas. Meddela även namn på de personer, som därstädes tala esperanto.

Då dessa upplysningar komma att bli av utomordentligt värde för esperantosaken, be vi enträget, att var och en, som kan ge upplysningar, snarast tillskriver oss.

26-a Universala Kongreso
de Esperanto.

Fredsgatan 4, Stockholm.

Gösta Berling kiel vivoverkajo.

De

Börries Freiherr von Münchhausen,

Tradukts

Albrecht Naumann, Grossenhain,
Germanujo.

Preskaŭ ĉiuj poetoj, ankaŭ la plej grandaj inter ili, kreis unu verkajon, kiu kiel la plej hela lumero de kristalo ŝajnas enhavi la sumon de ĉiuj lumantaj edroj de ilia ecaro. Oni parolas pri la *ĉefverkajo*, — sed tiu estas vorto, kiu troe estas fiksitaj je eksteraĵo kaj elparolas valorjuĝon, kiu ne necesas esti senkondiĉe ĝusta. Nur la plej konata ĝi ofte estas, kaj tio estas kurioza, ĉar ĝi nepre ne ĉiam estas la plej bona — Götz, Tasso, *Ifigenio en si* mem estas pli perfektaj ol *Faŭsto*. — Oni parolas pri la vivoverkajo, kaj tio jam estas pli ĝusta, ĉar en tiu libro pleje estas katenita pli da esenco de la poeto ol en ĉiuj aliaj. Sed la verkajo ne necesas esti skribita kiel *Faŭsto* dum la daŭro de la tuta vivo. Gösta Berling staras ĉe la komenciĝo, *Don Quixote* (*Don Kiĥoto*) en la mezo, la *Perdiĝinta Paradizo* ĉe la fino de longa poenvivo. Sed ankaŭ la plej alta famo ne ĉiam ĉirkaŭlumis tiun verkajon de poeto — la *Werther* superis per efiko la pli postajn librojn de Goethe, precipe, se oni subtrahas de ili la lavangsimile kreskantan puŝpovon de la nomo altigita tra ses longaj jardekoj. Kaj tamen ni neniam *Werther*-on nomus vivoverkajo.

Selma Lagerlöf estiĝis la poetino de Gösta Berling, kvankam multaj el ŝiaj pli postaj libroj estas artiste koncentrigitaj, kelkaj pli katenantaj, eble ankaŭ tiu ĉi aŭ tiu pli vigla ol tiu unua verkajo. Malgraŭ ĉio neniu dubos, doni al tiu romano la nomon de ŝia vivoverkajo. Ĝi havas kelkiujn radikojn, pri kiuj ne ĉiam estas necese esti ekkonataj kaj esti sciataj de ĉiu. Ĝi estas *la romano de ŝia junaĝo* — preskaŭ ĉiuj plej grandaj romanoj laŭ io estas rememoraĵoj pri la junaĝo, kaj en ĉiuj memverkitaj biografioj la unuaj ĉapitroj estas la plej bonaj. Ĝi estas *la romano de ŝia hejmlando* — ĉiu alta arto estas ligata al hejmlando, tiom malmulte ĝi povas aŭ povos resti en la hejmeja arto. Ĝi estas *la romano de ŝia mondpercepto*, tiu

verege sana percepto pri vivo kaj homoj, en kiu malgraŭ ĉiu pasio ne ekzistas iu maldecaĵo kaj malgraŭ ĉiu superstiĉo neniu nerealeco.

La romano havas tute precizajn proprecojn kiel aliaj pli grandaj kaj pli malgrandaj vivoverkaĵoj. Estas en ĉiuj tiuj, kvazaŭ la poeto estus intencinta verki nur tiun unu verkaĵon, kvazaŭ li plantis pro tio ĉion, kio kuŝis en li kiel ĝermo de artaĵo, en tiun unu bedon. Tie estas surprizanta epizodeco unu el la karakterizaĵoj de tiaj libroj; ili ricevas ion mozaikecan. Oni povas disigi el Ekkehardt de Viktor Scheffel preskaŭ memstarajn novelojn (Aŭdifax kaj Hadumoth, Capan); oni povas prezenti partojn el Faŭsto kiel memstarajn dramojn, oni povas ellevi el Jörn Uhl de Gustav Frenssen kolektaĵon da rakontetoj, represi el vivoverkaĵo de Immermann preskaŭ laŭkutime ĉiam nur unu parton, la »Oberhof«, prelegi el »Furioza Rolando« tute proprevivajn pecojn. Tiel ankaŭ en Gösta Berling estas legeblaj partoj, kiuj ŝajnas havi tute propran vivon, ja oni preskaŭ povas aserti pri tiu verkaĵo, ke ĝi estas kadra rakonto kun enmetitaj bildoj. Por malrapidemaj legantoj, kiuj nur pene povas ne intermiksi la unuopajn personojn en la interplektado de tiom da sortoj, mi metis papereton en mian ekzempleron de la verkaĵo, sur kiu la biografioj estas ordigitaj laŭ ĉapitroj. Tie do temas eble: La majoredzino: ĉap. 2, 4, 7, 9, 30. Mariano Sinclair: ĉap. 7, 8, 23. Grafino Märta Dohna: ĉap. 12, 13, 18, 21 ktp. — Aŭ oni povas sendependiĝi la sortojn de la kavaliroj Lilliecrona, Christian Bergh, Oerneclou kaj Löwenberg, aŭ la amajn travivaĵojn de Gösta kun Ebba, Anna, Mariano kaj la grafino Elizabeto. Jam la ebleco de tia eligo montras, kiel la partoj estas memstaraj kontraŭe de tutaĵo. Neniam tiu metodo estus ebla aŭ povus esti sentata kiel dezirinde en »Ringo de generalo«, en »Mito pri kavaliro bieno« en »Jerusalem«.

Sed tiu fakto ne nur montras, kiel supre dirite, ke la poeto semis ĉiujn siajn grenerojn sur la saman kampon, sed ankaŭ, ke en la kadra rakonto vivas io el sia propra vivo, en la ĉefpersono io el lia propra sango. Goethe estis Faŭsto, kaj ties sortoj ĉiuj estas pli malpli ekkoneble liaj, de la poeto, sortoj. La aventura vivo de Cervantes same kiel lia eksterordinara kaj nobla karaktero estas enhavataj en Don Quixote, kaj

la melankolia moko, kiom malmulte per tiom da nobleco, estas atingite por aliaj, fine ankaŭ por la kavaliro mem, estas unu el la profundaj akordoj de tiu vivo-verkaĵo. Tiel ja Lagerlöf ne nur estas vere enamiginta en Gösta-n, ne, ŝi mem estas parto de li, kiel li estas parto de ŝi. Estas nepre kontraŭ mia sento, serĉegi en la vivo de aliaj honestuloj, sed ke tiu virino en sia animo estas *travivinta* la sortojn de la eksoficigita pastro, tion mi opinias rajte diri, sen esti nekavalira.

Sed ne nur tio donus al la verkaĵo ĝian modelan — senekzemple modelan! — forton. Se popolo en sia tutaĵo akceptas la verkaĵon de iu poeto, tiam tiu verkaĵo ankaŭ devas simili al ĝi laŭ esencaj trajtoj. Ne laŭ ĉiuj, certe, ankaŭ ne ĉiam laŭ la plej amika formo. Sed tio estas certa: Nur kiam la popolo vidas en la heroo paradigmon, prototipon de si mem, tiam la verkaĵo plene asimiliĝas. La Furioza Rolando estas la aminda, sperta en mondaj aferoj kaj aventurema italo ĉirkaŭ 1500, la Don Quixote estas la nobla, fantaziema, travivsopirema hispano, Faŭsto estas same unu paradigmo de la germano kiel Eulenspiegel (Ojlen Spiegel = Strig'spegulo) estas alia —; ke la nederlandanoj lin same plene povis transpreni kiel Reinecke (Rejneke) Vulpo, tio pravas nian proksiman parencecon kun ili. Neniam eble italoj, eĉ ne grekoj, povus imagi, komprene legi, aligi al si en tiu formo tian Eulenspiegel aŭ Reinecke.

Tiel ankaŭ Gösta Berling estas ne nur Selma Lagerlöf, sed li estas ankaŭ samtempe la *svedo*, el kiuj ĉiu unuopa opinias ekkoni en li iun fraton laŭ bonaĵo aŭ malbonaĵo. Facilanimeco, trinkemo, kompatato, sentoĝojo, cerbumeco, superstiĉo, petolemo, ŝinoferemo — oni povas skribi multajn liniojn da ecoj, kiuj estas vere Berling-aj kaj vere svedaj.

Plia karakterizaĵo de ĉiuj vivo-libroj estas tiu, ke ili estas verkitaj en la lingvo de ĉiutago. La klasikaj jamboj de Ifigenio, de Tasso malebligas efektive la osmozon de tiaj verkaĵoj tra la anima haŭto de la germana popolo, male la al ni laŭnatura reigo de la akcento al la komenca silabo, la troĥeoj de Wilhelm Busch ne pli ol la »bastonegaj versoj« (kvartaktaj rimparoj) de la komenco de Faŭsto samecigas al ni. Nome tiuj bastonegaj versoj, kiel ilin nomis la arogaj klasikaj magistroj, estas la plej delikata, kion ni havas en la germana lingvo, estas artformo nur ebla en la

germana, en kiu la ekstera kaj interna formoj akordiĝas en mirinda unueco. Nia lingvo (la germana) ne havas »longecojn» kaj »mallongecojn» kiel la latina, ĝi havas minimume kvin delikate gradigitajn tonaltojn, kiuj nepre estas io alia ol »longecoj» kaj plejprofunde estas parencaj kun la vortsenco! — Sed dependas ne nur ĉe versoj de la supre nomita ĉiutago, sed ankaŭ ĉe la lingvo. Ariosto neniam estus povinta ek-esti poeto de itale parolanta popolo. Dante sciis, kial li skribis sian eternan verkaĵon kiel »komedion» t. e. en la ĉiutaga lingvo de sia popolo (li nomis ĝin »vulgaris eloquentia»). Luther »observis la buŝon de la simpla viro», kaj Goethe »uzis kun la plej ĝusta sento la kun-naskitan idiomon», kaj kiu mallaŭdis lian ĉiutagan germanlingvon, al tiu li respondis: »La urso grumblas laŭ la kaverna, en kiu ĝi naskiĝis.»

Tiel ankaŭ la plej fama rakontantino de niaj tagoj skribis lingvaĵon, kiu estas klara kiel la akvo de ŝiaj grandaj hejmregionaj lagoj. Selma Lagerlöf ridetante kaj iom moke ŝovas la lingvostultaĵojn de siaj, niaj samtempuloj de sur sia skribtablo, same kiel ĉiuj geniuloj agis en ĉiuj epokoj. Certe la lingvo evoluigis delikate en la buŝo de ĉiuj grandaj poetoj, sed en kaŝema kreskado, ne en konvulsia sensaciemo. Ĉu ne estas mirinde, kiel tiu adorata de la popoloj sur ĉiuj kontinentoj poetino, la pleje legata poetino de nia jarcento, kies verkaĵoj estas tradukitaj en 30 lingvojn, kiel tiu poetino skribas tiel simple, ke ĉiun en ŝiaj verkaĵoj infano povas kompreni!

La mondo *pli feliĉiĝis* per la verkaĵo de Selma Lagerlöf. Kaj *pliboniĝis* la mondo per ŝia silenta, nobla kaj delikata verkaĵo. Ŝi neniam estis celpoetino, kaj tamen ŝi estas unu el la gvidantinoj de nia tempo.

*

Ni uzas la okazon mencii al niaj legantoj, ke en la plej proksimaj tagoj *Gösta Berling en esperantotraduko* aperos ĉe Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. Tradukis Stellan Engholm. (Vidu la anoncon en kovrila paĝo 3!)

Sveda Antologio estas manuskripte preta kaj jam komenciĝis la presado. Oni esperas pri apero ĝis la XXVI-a.

Red.

Surprizo.

De Ella Nilsson.

Ingrid havas multajn korespondantojn. Per Esperanto ŝi letere interrilatas kun homoj el preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo. Ŝi trovas grandan plezuron en sia internacia korespondado kaj precipe nun ŝi havas kaŭzon por ĝoji, ĉar en aŭgusto dum la Universala Esperanto-Kongreso en Stockholm ŝi renkontos kelkajn el siaj eksterlandaj geamikoj.

Estas sunbrila tago. Ingrid sidas ĉe la skribtablo en sia ĉambro kaj respondas esperantajn skribaĵojn. La plumo rapide kuras sur la papero, sed subite ĝi haltas. Tra la malfermita fenestro ŝvebas siringaodoro kaj kukola krio aŭdiĝas el proksima arbeto. Kiom bele estas ekstere! Ingrid ĝuas la ĉarman vidaĵon de suno, floroj, abunda verdaĵo kaj fore brilas blua strio. Kaj ŝia penso flugas trans helajn betulojn, trans bluan maron al suda lando, kie flamas la oranĝoj kaj loĝas adorata persono kun la tre belsona nomo Aleksandro. Ŝia koro forte batas. Ĉu li venos? Eble! Ŝi ankoraŭ ne scias, sed pri tio certe informos ŝin lia venonta letero.

Jen aperas sur la ĉefvojo figuro konata kaj treege sopirata . . . (almenaŭ de junaj knabinoj, kiuj korespondas per Esperanto) . . . la leterportisto. Ingrid lin ekvidas, rapide elkuras kaj estas preskaŭ koliziona kun li ĉe la ĝardena kradpordo.

»Domaĝe, domaĝe, fraŭlino, nur unu hodiaŭ!»

»Nur unu?» la voĉo de Ingrid kvazaŭ riproĉe sonas, sed ŝiaj okuloj ekbrilas, kiam la leterportisto transdonas al ŝi leteron kun itala poŝtmarko. — De Aleksandro!!! Apenaŭ ŝi sidiĝis sur benko en la ĝardeno por legi lian leteron, kiam aŭdiĝas paŝoj sur la ĝardena vojo kaj sonas moka voĉo:

»Vi do faras nenion alian krom legi amleterojn!»

»Amleterojn? Tute ne estas amletero,» kolere diras Ingrid, dum ŝiaj vangoj ruĝiĝas kiel la tulipoj en la florbedo.

Ho, tiu impertinenta frato! Ĉiam li aperas, kiam oni volas esti sola.

»De kiu?» daŭrigas la moka voĉo. »De la nigra turko, ĉu ne?»

»Turko! Mi eĉ ne konas tian. Cetere, ĉu vi iam vidis *nigran* turkon?», ekkrias la knabino, dum ŝi levas sin kaj for-

kuras el la ĝardeno por serĉi alian rifuĝejon, kie ŝi povas en kvieto kaj trankvilo legi sian sopiratan leteron.

Ŝi rapidas antaŭen sur la ĉefvojo. Ranunkoloj brilas ĉe la fosajorando kaj veronikoj elrigardas el siaj verdaj litoj. Ŝi ĝuste estas malfermonta la leteron, kiam iu vokas ŝian nomon. Ingrid sin turnas malantaŭen. Jen, ŝia amikino Brita venas kure sur la vojo, gaje svingante la manon.

»Bonŝance, ke mi trovis vin! Mi ĵus serĉis vin en via hejmo, sed vi ja ne estis tie. Ho, mi havas ion tre, tre gravan por rakonti!»

»Kion do, mi estas tre scivola.»

»Imagu, li venos al la Stokholma kongreso!»

»Kiu?»

»Tom,» diras Brita per karese dolĉa voĉo.

»Ho, via angla korespondanto! Kiom amuze!»

»Jes, jes,» diras Brita gaje sed daŭrigas iom malpli entuziasme: »Lin akompanos la tuta familio.»

»Ĉu li havas familion?» — La okuloj de Ingrid pligrandiĝas.

»Jes, estu certa pri tio, patrinon kaj tri fratinojn. Kaj ĉiuj venos, ĉiuj senescepte. Bona gardantaro, ĉu ne?»

Ingrid ridas. »Sed kiom ĝojos la kongresa komitato!»

»Kaj ĉiuj, kiuj garantiis pri la kongreso! — Sed, ĉu ankaŭ vi ricevis leteron? Kion li skribas? Rakontu, rakontu!»

»Mi ankoraŭ ne ĝin legis,» diras Ingrid.

Brita aspektas kiel demanda signo vivanta. »Legu do, legu! Mi promesas ne ŝtelrigardi. Ni iru tien,» ŝi proponas, fingre montrante al apuda herbejo.

La knabinoj sidiĝas inter odorantaj saksifragoj kaj Ingrid iom nerveze nun fine elkovertigas la skribajon.

»Brita, rigardu, rigardu!» — En ŝia mano ŝi tenas fotografajon de juna viro kun tre inteligenta kaj simpatia aspekto. Ĝis nun ŝi vidis sian adoratan Aleksandron nur sur etaj simplaj amatorfotoj. Sed kiom amuze ricevi veran portreton!

Brita eligas admiran ekkriion. »Li ja aspektas kiel olimpa dio!»

»Kiaj okuloj, kiaj haroj! Kaj kvazaŭ la frunto de Mussolini!»

»Kaj la nazo de la papo!» aldiras Brita ridante. »Grandioze, grandioze! — Sed ankaŭ Tom estas ĉarma, majesta, alt-

kreska kiel princo Wilhelm — sed tute ne tiom malgrasa. Kaj li estas lerta rajdanto kaj mi konjektas ke li dancas bonege. Kiom mirinde — (Brita turnas la okulojn al la ĉielo) — ĉirkaŭvalsi kun Tom en la Blua Salono!!!»

Sed Ingrid ne aŭskultas. Ŝi profundigis en la legado de la valorega skribaĵo. Neniu povas skribi kiel Aleksandro! Sed iom post iom ŝia mieno malgajiĝas.

»Ĉu li venos?» demandas Brita sci-vole.

»Li eĉ ne unu vorton skribis pri tio», respondas Ingrid, aspektante kvazaŭ ŝi estos kondamnita al morto. »Certe ni neniam renkontiĝos!»

»Almenaŭ en Romo dum la kongreso venontan someron», diras Brita, provante iom konsoli.

Ingrid legas paĝon post paĝo, dum Brita malpacience atendas la finon de la kilometrolonga epistolo. Kaj la fino venas kun karaj salutoj kaj ĉiuj kutimaj akcesoraĵoj.

Tiam Ingrid subite ekkrias.

»Ĉu vespo pikis,» demandas Brita an-gore kaj fulmrapide forlasas sian lokon.

»Li venos, li venos,» sonas kiel triumfa fanfaro.

La rigardo de Ingrid kvazaŭ algluiĝis al la letera postskribo:

»P. S. Ne forgesu bone atenti, ĉar vi eble ekvidos inter la kongresanoj konatan figuron. Mi kunsendas kopion, por ke vi certe rekonu la originalon.

L. S.»

»Kvazaŭ songo», diras Ingrid feliĉega.

»Mi preskaŭ envias vin», konfesas Brita sincere.

»Vi? Kial?»

»Ĉar li certe venos — sen gardantaro.»



Nya priser på esperantomärken.

På grund av att vi övergått till esperantomärken av kraftigare och hållbarare material har priset måst höjas något.

N:r 1 a, 1 b (grön stjärna med inskription »Esperanto») samt

N:r 3 a, 3 b och 3 c (grön stjärna på vit botten; rund) kosta nu 1 kr. pr st.

N:r 5 a, 5 b och 5 c (UEA-märken) kosta hädanefter 1:25 pr st.

Nyhet. N:r 7. Miniaturstjärna på vit botten, rund, med nål 0:60.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

De ĉie - pri ĉio - al ĉiu.

ESPERANTO KAJ LA PARIZA FOIRO.

Koncerne tio necesas mencii, ke la Foiro de Paris eldonas propagandajn dokumentojn por fremdlandoj en proksimume dudek lingvoj inter kiuj Esp. Tiun jaron, speciala broŝuro estis dissendita en ĉiujn landojn en la mondo kaj kaŭzis grandegan intereson. En Foiro de Paris, pri korespondado kun nefrancoj, kompreneble franca lingvo estas la plej uzata, sed Esperanto estas la dua antaŭ angla kaj germana lingvoj.

(*Esperanto-Réalisations. Aprilo.*)

AL LA GRUPOJ,

do, mi faras alvokon. Kontaktigu unu kun alia! Precipe faru internaciajn kontaktojn! Grupestroj kaj simplaj grupoj rekte interkonatiĝu kun viaj kolegoj alilande. Koresponde interŝanĝu programojn kaj ideojn. Organizu reciprokajn grup-vizitojn. Fariĝu unu por alia ne nuraj nomoj, sed konataj amikoj.

(*Heroldo de Esperanto 6-a de Majo.*)

LA REĜO KAJ ESPERANTO.

En la ĉirkaŭantaro de Gustavo V oni scias, ke Lia Reĝa Moŝto konas la viglecon de la sveda esperanto-movado kaj ne ignoras ĝin.

La reĝo estas bone informita pri la nombro senĉese kreskanta de la esperantistoj ĝis en la plej nordaj urboj de sia regno, eĉ ĉe la nomadaj lapoj. Li ja scias, ke praktikaj rezultoj estas jam akiritaj, nome rilate la turismajn interŝanĝojn inter Svedujo kaj la baltaj landoj kaj, kun nedubebla simpatio, li konsideras la movadon, ties celon kaj sukcesojn. Tiu simpatio varmiĝas per la penso, ke la helplingvo estas atendinda perilo por la reciproka interkonatiĝo de la popoloj, ke ĝi prezentas unu el la plej efikaj rimedoj — se ne la plej efikan — por pliproksimigi la spiritojn kaj la korojn de la homoj, ne endanĝerigante ties naciajn tradiciojn.

Jen tio, kion mi kun komprenebla plezuro aŭdis en la ĉirkaŭantaro de L.R.M. Gustavo V de Svedujo kaj kion oni ne malpermesis, ke mi publike ripetu.

Laŭ tio oni vidas, ke la XXVI-a, kiu certe kunvenigos imponan kongresan-

aron, trovos en Stockholm ne nur ŝatindan organizon kaj amike varman akcepton, sed ankaŭ atmosferon plej favoran al la kongresaj plezuroj kaj laboroj.

(*Nia gazeto. Aprilo.*)

FRITZ STOCKINGER,

ministro de Aŭstrujo diris en sia radio-parolado *esperante*: Nia aŭstria Esp. radio-servo pruvis, kiel *treege* efika estas la reklamo per tiu helplingvo

(*Aŭstra Esperantisto. Aprilo.*)

NOVA ZAMENHOFA STRATO

ekzistas en la moderna palestina urbo Tel-Aviv.

(*Esperanto. Aprilo.*)

PRINTEMPO EN AŬTUNO —

romano de Julio Baghy — baldaŭ aperos en ĉina lingvo.

(*Hungara Heroldo. Majo.*)

SVEDA VESPERO EN ROTTERDAM.

Parolis s-roj Brakel, Ijisselstein, de Mirande, Telling. Poste sekvis la filmo pri la belega Nordo kaj intima balo.

(*Nederlanda Esperantisto, Majo.*)

DU INTERESAJ CITAJ:

Lidja Zamenhof parolas jene en la maja numero de Pola Esperantisto: »Esperanto devas evolui, certe! Kaj la lingva evoluo sendube devas posttiri asimiladon de novaj radikoj kaj formoj. Sed la kriterio de la akcepto ne estu: 'Tio kontentigas mian guston', sed: 'tio estas necesa, por esprimi ideojn, alie ne esprimeblajn, aŭ esprimeblajn tro artifice'. Mi levas mian voĉon kontraŭ tiu danĝera sporto, kiu instigante siajn adeptojn al ĉiam novaj lingvaj artifikajoj, iom post iom forpuŝas Esperanton de ĝia idealo: Lingvo internacia, simpla, facile komprenebla por ĉiu.»

En la japana »*ESPERANTA LITERATURO* (Tokio, Marto.)

Mijake Sihej diras en recenzo la jenajn vortojn: »Pri la neologismo, mi estas pli indulga, ol kelkaj kritikistoj. Kvankam mi estas partoprenanto de la lasta kongreso, kiu sendis al la eŭropa esperantistaro rezolucion. Esperanto devas kreski pli alten por pli precipe esprimi la ĉiutage kreskantan homan idearon. Por tiu celo ni ne povas rezisti antaŭ la enfluo de necesaj neologismoj. Krome ni devas scii ke tromultigo de kunmetitaj vortoj estas kripligo de la lingvo. Sed — neologismoj estu enkondukataj, nur kiam mankas taŭgaj vor-

toj por esprimi ideojn, sed ne tiam, kiam la aŭtoro ne povas sukcesi trovi la malbenitan trian rimon.

NOVA INTERNACIA LINGVO.

Prof. Rodolfo Lenz proponas la lingvon »papiamento» (parolata de kreolaj indiĝenoj de Kurazao. Li iom malestimas esperanton. (*Scienca Gaz. Aprilo.*)

Hundo ne bojus sub arbo, se ĝi povis surgrimpi ĝin. (Kroata proverbo el *Esperanto, Aprilo.*)

ĈARMA ANONCO

el Literatura Mondo: Mi estas 7-jara esperantistino. Sendu al mi poŝtkarton kaj mi sendos al vi mian foton. Christian Léger, Ecole Militaire, Les Andelys, Francujo.

El la recenzo pri »LA MONO DE SINJORO ARNE»

(en la Katolika Espero. Majo): La rakonton kun belegaj kaj interesaj detaloj oni legas kun granda ĝuo Enhave kaj lingve nenion ni povas riproĉi....

LA JAPANOJ —

diras la Orienta Revuo — ofte ne povas diferencigi la sonojn *l* kaj *r*. (Ni legis japanan leteron kun tiaj vortoj: bedaŭlinde, dorĉa kuko.)

LA FRANCA PARLAMENTA GRUPO

por la defendo de Esperanto kalkulas nun 68 membrojn.

(*Franca Esperantisto. Aprilo.*)

EL LA NOTLIBRO DE LA PRESDIABLO:

Verda stelo de ...urbo eldonas informilojn por la membroj. La lasta ordo tekstas jene: »Dezirojn kaj postaĵojn oni direktu al la grupestro. (Pro la vereco de la citaĵo garantias Esperantobladet.)

En alia esp. gazeto ni legis la jenan dusencan frazon: »En tiu ĉi tago *la neniam sufiĉe ŝatata* f-ino X fariĝis 80jara. Vere rimarkinda jubileo en nia historio.»

PROKSIMUME 20 POLICISTOJ

anoncis sin al la stokholma Esperantokurso.

Kompilis: *Fersil.*

LIBERA ANGULO

Tre estimata sinjoro SZILAGYI,

Via publika letero, kiun mi trovis sur la simpatiaj paĝoj de la sveda organo — estis por mi vera surprizo.

Legante la svedan gazeton, mi rimarkis hazarde plumeraron: vian *definitiva artikolo*.

Mi akcentas, mi opiniis tion plumeraro, sed, ke vi povas defendi vian »monstron», tio mirigis min, ĉar vi ne pravas. En neniun lingvon de l' mondo, laŭ mia scio, oni diras *definitiva artikolo*, sed oni diras *determin(it)a* aŭ *difin(it)a artikolo*.

Kio estas *difina artikolo*? Partikulo, kiu *difinas, determinas*. Jen ekzempla frazo: Zamenhof longe pensis antaŭ ol elekti la *definitivan* formon de la *difina artikolo*; fine li elektis la formon: *la*.

Kaj nun pri *unu*. Ne, kara s-ro Szilágyi, vi ankaŭ ne pravas: jam en la *Fundamento*, kiun vi ankaŭ respektas, estas la fama frazo: *Unu* vidvino havis du filinojn. Tutsimple ni nomu tiun unu pri kiu ni diskutas ne *nedifina artikolo*, sed *adjektivo*, kaj per tia nuanco ĉio estos komprenebla kaj en ordo. Zamenhof uzis ofte *unu* en tia senco kaj eĉ en liaj lastaj verkoj estas *kelkdeko da ekzemploj*. Tion oni ne povas nomi eraro.

Vi uzas en via letero la vorton »disputeto», mi konfesas, ke eĉ tiun mi trovas troa. *Disputojn* mi ne ŝatas, sed al *diskuto* mi ĉiam estas preta.

Esperante, ke mi havos la plezuron premi vian manon dum la certe tre sukcesa Stokholma Kongreso kaj rediskuti pri *unu* vidvino, kiu havis du filinojn .. mi restas kun kora saluto

S. Grenkamp.

Tre estimata sinjoro GRENKAMP,

dankon pro la afabla letero. Pri la unua »problemo» mi jam skribis mian opinion kaj mi ja ne volas tion ripeti. Laŭ mia opinio mi ne havas kaŭzon penti, sed cetere tiu parto estas tute malgrava.

Multe pli grava estas la afero de »unu». Mi devas ja denove fiksi mian vidpunkton, laŭ kiu la liberaleco en tiu rilato kaŝas en si grandan danĝeron, kaj pro tio *neniu kaj nenio* povas motivi

Från Riksstudieledaren.

Sommarexercis.

Nu är de flesta skolorna slut för terminen. Eleverna ha lagt böckerna på hyllan och stormar ut i naturen för att njuta av sol och sommar. Det är en härlig tid, som vi nu kommit in i. Friheten vinkar.

Även studiecirkelarna har avslutat sin termin, och för en del av dess medlemmar blir det tyvärr på samma sätt som med skolbarnen: de lägger böckerna på hyllan och bereder sig att fira friheten i skön glömska av allt vad plugg heter.

Det är emellertid långt ifrån alla, som gör så. Väl är ju det förresten. En studiecirkel är ju inte en skola i vanlig mening med läraren i katedern, betygsjakt och examen. Den är en skara ungdomar, som av intresse för ett ämne slutit sig tillsammans för att gemensamt lösa problem och samla lärdomar. Ingen driver på dem. De arbetar i den takt och den omfattning, som de ha lust till. Studium, som uteslutande bygger på intresse, ger resultat.

Esperantocirkeln får inte sluta i och med sommarens inbrott. En hel sommars avbrott river stora luckor i vetandet. Språkkunskaper sjunker lätt ner i glömskan, om de inte användas.

När en kurs slutar, så börjar den, är en paradox med sanning i. Repetitionen är all kunskaps moder.

Efter vintermånadernas esperantostudier måste följa sommarrepetitioner. Det är inte svårt och behöver inte bli tråkigt och betungande.

Det går mycket bra att, när man ligger i gräset utanför campingtältet, låta tankarna kretsa kring det, som möter ögat runt om i naturen och översätta alltsammans på esperanto. Man kan hålla ett helt esperantotal för sig själv om allt det tjusiga som blommar och lever en sommardag.

På promenaden är det intet, som hind-

tion, ĉar la limo inter la artikolo kaj »adjektivo» estas ofte tro pala.

Cetere, mi estas tre kontenta, ke la komencita »disputeto» iĝis diskuto.

Gis nia renkonto: korajn salutojn sendas

D-ro F. Szilágyi.

rar, att man tänker på esperanto över det, som möter, gör reflexioner, ställer frågor och besvarar dem utan att den övriga mänskligheten behöver anse en som en tankspridd professor.

Naturligtvis kommer många att ligga på rygg på badstranden för att brunbrännas. När man ligger så där i flera timmar och slöar, sysslar tankarna med lite av varje. Varför inte låta dem syssla med esperanto. Det finns tusende saker och ting runt omkring, som man kan roa sig med att sätta namn på, bygga upp till meningar och forma till större sammanhang.

Låt alltså inte studiearbetet ta slut med sommarens ankomst. Fortsätt på egen hand, och stå redo att starta igen, när hösten börjar.

Studieledaren är förvaltare av studiecirkeln. Han ska vara i tjänst även under sommaren. Ett par veckors semester ska han ta, då han kopplar av och slår sig lös, men annars ska han komma ihåg, att sommaren är förberedelsernas tid. Gör han det, blir starten i höst lätt och resultatet gott.

Einar Dahl.

— ★ —

Radens Mustaphas planerade föredragsresa

har väckt livligt intresse bland esperantisterna i landet. Alla de olika önskemål som inkommit är det naturligtvis omöjligt att tillfredsställa, fast naturligtvis allt göres för att tillmötesgå de olika önskingarna. Redan nu kan meddelas, at föredragsresan sannolikt kommer att taga sin början i det nordliga Sverige efter universella esperanto-kongressen, vilken s-ro Mustapha kommer att bevisa. Där kunna alltså föredragsanordnarna träffa honom och i förväg lära känna s-ro Mustapha, som i Tjeckoslovakien och Österrike vunnit allmänt erkännande för sina föredrags gedigna innehåll och det utmärkta framförandet. Som redan meddelats i maj-numret av tidningen är s-ro Mustapha beredd att tala över ämnena:

Java, de idealiska kvinnornas land.
Bali, gudarnas och demonernas land.
Java, land och folk.

En del förfrågningar ha inkommit om

LIBROJ KAJ GAZETOJ

DR. ST. KAMARYT: *Filozofia Vortaro.*

(Eld. Moraviaj Esp. Pioniroj, Olomouc, 170 p.)

Tre bela libro, kiu ne estas plena vortaro de la filozofio, sed konciza, klara difino de sufiĉe multaj filozofiaj konceptoj. Tre grava verko, sed certe kompletiginda. Trafoliumante la libron, ni konstatis la mankon de tre kutimaj esprimoj de la logiko: indukcio, dedukcio, asociacio, silogismo ktp.

AISBERG: *Fine mi komprenas la radion!*

Originala verko. Eld. Literaturo Mondo, Budapest. Prezo kr. 5:75.

Malofte okazas eĉ en la naciaj fakliteraturoj, ke faklibro estas tradukita en 13 lingvojn. Des malpli ofte oni tradukas Esperanto-verkon en naciajn lingvojn. La sprita, amuza kaj ĉion klariga verko de Aisberg atingis tion kaj plenerite. Abstraktaj, kaprompaj problemoj simpliĝas en la libro ĝis facila ĉerco, ĝis saniga rido. — La libron ornamas harmoniaj karikaturoj.

Se vi volas kompreni la radion sen ŝvitperloj, legu tiun ĉi vere amuzan kaj inteligentan libron, kiun oni ne povas malŝati. *Szilágyi.*

JANIS RAINIS: *Amo estas pli forta ol morto.*

Trad. el la latva: Ints Ĉaĉe. Eld. Latva Esp. Societo, Riga.

Tiu ĉi belaspekta libro meritas la plej grandan atenton de la internacia legantaro.

La kerno de la dramo estas historia fakto, kiu okazis antaŭ 300 jaroj. Estas

kostnaderna för s-ro Mustaphas föredrag. Enhetspriset blir 30 kr, vari även ingår ersättning för resor o.s.v. Efter offentlig föreläsning är s-ro Mustapha villig att gratis tala å ortens esperantoförening.

Vissa distriktsstyrelser ha redan beslutat ordna föredragen inom sitt distrikt. De övriga uppmanas att förfara på liknande sätt. Tillskriv den av S.E.F. utsedde arrangören för föredragsresan:

E. Malmgren

Heleneborgsgatan 6, Stockholm.

plej oportune se ni citas la rakonton de rolanto, kiu en la lasta sceno resumas la tutan tragedion:

»Standardjunkro Adamo Jakubovski havas senbridan naturon, li estas fortulo, drinkulo, deloganto de virinoj, rapidaga kun malluma pasinto. .. Nu .. li deziris delogi ankaŭ Maija'n Greif; kiam ŝi kontraŭstaris, tiam kun helpo de iu virino forlogis Maija'n al groto, kie li deziris perforte atingi sian celon Sed tiam okazis io tute nekredbla. Maija promesis al li tukon, kiu .. havas tian sorĉforton, ke ĝia uzanto iĝas ne vundebla. Li estante superstiĉa, kredis tion — multe pli tiam, kiam Maija proponis, ke li elprovu tion ĉe ŝia kolo. Maija klinis la kapon kaj Jakubovski hakis per la sabro kaj tiel li mortigis ŝin. — Maija prefere perdis la vivon, ol sian virgecon.»

Ĉirkaŭ tiu ĉi historio plektiĝas la majstre verkita kaj bele tradukita tragedio, kiun la antaŭ ne longe mortinta latva poeto kolorigis per subtila mano. Jam en la komenco surprizas nin iu freŝa naiveco, kiu rememorigas la stilon de la antaŭrafaelaj italaj pentristoj kaj la sama atmosfero ŝvebas super la tuta dramo sen tio, ke ni sentus tiun ĉi kortuŝan naivecon kontraŭnatura.

Szilágyi.

DU GRAMATIKOJ.

a) SEPPIK-MALMGREN: *Snabbkurs i Esperanto.* (Förkortad syst. kurs avsedd för hotell-, restaurant-, bank- och trafikpersonal. Eld. Förlagsföreningen Esperanto, Stockholm. Prezo: 0.60 kr.)


Pri tiu ĉi libro ni povus ripeti la samajn laŭdojn, kiujn ni donis al la pli kompleta gramatiko de la aŭtoroj kaj jam nun ni povas antaŭdiri grandan popularecon al la libreto, kies bezonon ĉiu praktikulo sentis. La kongreso aktualigis la verketon, sed certe post la kongreso novaj eldonoj sekvos. Por rapidega lernado oni apenaŭ povas imagi pli taŭgan kaj kompletan verkon, ol tiu ĉi; praktikaj dialogoj, lertaj rakontoj, letertekstoj ktp. varias.

Por plifaciligi la ripetadon al la lernanto estus dezirinde, ke la aŭtoroj almetu al la sekva eldono ankaŭ enhavtabelon.

b) F. LINDÉN: *Kurs i Esperanto för självstudier och studiecirklar.* (Tredje upplagan. Eld. Förlagsföreningen Esperanto. Prezo: 0.90 kr.)

Interesa, bone verkita gramatiko, kies

Solvo de la krucvortenigmo n-o 4.



Trideko da solvintoj ensendis solvojn el kiuj la krucvorta komitatino Fortuno eltiris la jenajn tri *gustajn* solvojn, ensenditajn de la jenaj gesamideanoj:

1. S-ro Anton Palm, Uppsala,
2. F-ino Almida Zetterlund, Stockholm,
3. S-ro Ludwig Martensen, Hamburg.

Al ĉiu koran gratulon!

popularecon pravas la fakto, ke ĝia tria, eĉ plimodernigita eldono aperis nun. La gramatikaj klarigoj estas precizaj, la ekzemplaj tekstoj trafaj, ofte bonhumoraj, la vortprovizo granda; en kelkaj lecionoj pli ol 50 vortoj. Do, la aŭtoro pretendas fervoron de la lernanto, sed ni kredas, ke lia libro scipovas vekti la dezirindan fervoron. *Szilágyi.*

B. BJÖRNSON: *Gaja knabo.* (El la norvega: Liv Sandberg kaj Dordi Johansen. Eld. Norvega Esp.-Ligo. 92 p. Prezo: Nkr 1:50.)

La — en sia simpleco — ege ĉarma kaj freŝa novelo de Björnson sendube estas inda verko por enplanti ĝin en la Esperanto-literaturon kaj ni vere plezure raportas pri la apero de tiu ĉi libro. — La traduko estas bona; la tradukintoj bonŝance trovas la plej harmoniajn rimedojn: nur kelkloke ni spertis, ke la nacia lingvo iom tro influis la tradukintojn. (Ekz. la vorto: subfarmo ne estas sufiĉe komprenebla kaj la kunmetita estinta tempo estas tro ofta. La vorto: malblonda teruris nin.) Resume: legu la libron! *Szilágyi.*

Kreskigado de Novzelanda manĝobulbo en Svedujo.

En la februara numero de »La Espero» mi skribis artikoleon pri »Negoco inter Novzelando kaj Svedlando per Esperanto». La negoco konsistas el importo de Novzelandaj manĝo-bulb-semoj, kreskigitaj de tiea esperantisto s-ro Oscar Harding, kiu estas la sola kreskiganto de tiaspeca semo en la tuta lando. La bulbo, kiu havas la nomon »Bruna Deptford», estas tute nekonata en Svedujo. Mia korespondanto skribis ke tiu speco de manĝobulboj estas preskaŭ la sola bulbo, kiun oni kreskigas tie, ĉar ĝi havas diversajn favorecojn. Ĝi kreskas en la plej malvarmaj regionoj de la Nordinsulo kaj eĉ atingas grandecon de 1—2½ da funtoj kaj la gusto de ĝi estas tre bona kaj krome ĝi estas konservebla dum longa tempo. La semo, kiu estas kontrolita en la N. Z.-a ŝtata legom-kontrollejo, havas ĝermecon de 98 %.

Proksimume 30 geesperantistoj el diversaj lokoj inter Sundsvall kaj Lund, mendis specimenojn de la semo. Ni promesis ke ĝi venu komence de aprilo, sed pro malfruiĝo dum la veturado ĉi tien ĝi ne venis antaŭ la 2-a de majo, malgraŭ ke ĝi estis forsendita el Templeton en N.Z. la 24-an de februaro. Malgraŭ la malfrua tempo multaj tamen aĉetis kaj semis ĝin kaj en mia hejmmregiono oni nun en preskaŭ ĉiu ĝardeno povas vidi la eksterlandan bulbon ekvegeti. nun nur restas vidi la rezulton.

Al la geaĉetintoj mi volas direkti peton. Kiam vi estos rikoltintaj la bulbon sendu al mi sciigon (preferu en Esperanto) pri la sukceso de la kreskigado, ĉar viajn atestojn mia amiko poste uzos en sia propaganda laboro per paroladoj kaj gazetartikoloj ke Esperanto estas tre ideala kaj taŭga lingvo kiel internacia komerclingvo. Ankaŭ konigu la aferon al ĝardenistoj kaj legomkreskigantoj por ke ili provu la semon venontjare kiam mi intencas importi pli grandskale. Interesantoj petu de mi plurajn informojn pri la afero. (Vidu mian adreson en la februara numero.)

Samideane
Eric Fredin.



Dorika Morariu

La ĉi-supran portreteton la feliĉaj gepatroj donacis al la redaktoro. Tiu ne povas ne redoni la trajtojn de la nova ĉarmulineto en »la juna Esperantujo«.



Jag vill peka på ett litet faktum


som är värt att uppmärksammas. I fråga om studiecirklar i allmänna ämnen är det oftast så, att ju djupare man tränger ned i ämnet, desto trängre blir passagen, och desto färre marscherar vidare mot slutmålet, över vilket ordet »perfekta» lyser. Erfarenheten besannar detta.

Ifråga om esperanto behöver det inte vara så, ty det är faktiskt på det sättet, att ju bättre grepp på språket man får, ju mera man kartlägger av dess grammatiska och ideella innehåll, desto större möjligheter ger det, desto rikare och njutningsfullare blir studiet. Det blir ungefär, som när man är på vandring upp mot utsiktspunkten på bergets topp: för varje avsats jag når öppnas vidare vyer, får jag ett mera omfattande begrepp, ett än mer inspirerande totalintryck.

Esperanto blir inte svårbegripligare, mera tillkrånglat, mera abstrakt, ju mer det studeras. Det är svårast att öppna den förseglade boken, att vända bladen är ett lekverk.

Einar Dahl.

Sture-Tryckeriet, Stockholm 1934.



Helpu — mi ne povas naĝi!
Ne kriu tiel, ankaŭ mi ne tion povas fari.

Granda Esperanta Taĝo en Læppe la 15-an de Julio.

Al multnombra partopreno invitas la distrikto de S.Ö.V.

Prelego de s-ro S. Stuit el Holando.

La estraro.

Andelsägarna

i Förlagsföreningen Esperanto u.p.a. kunna lyfta av årsmötet fastställd utdelning av 60 öre pr andel mot insändande av kupong n:r 7 kvitterad.

Styrelsen.

Korespondado.

Esperantist och missionsvän önskar korespondera med S.M.F.-ungdom och juniorer, som ha studerat esperanto. G. A. Swanson; 3305 47th Ave. So.; Minneapolis, Minn. U.S.A.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn el nordaj ŝtatoj, precipe el Danujo kaj Norvegujo. Bazo Yvert kaj Michel. Skribu nur seriozaj filatelistoj. S-ro Mujzer Béla, Szombathely, Királyutca 8, Hungarujo.

In- och Utländsk Litteratur

Esperantoavdelning

Nya Aktiebolaget Biblioteksbokhandeln
Biblioteksgatan 12, Stockholm

La Espero

La Tagiĝo

Niaj plej ŝatataj kantoj en Esperanto

SUR GRAMOFONA DISKO ●

Solvoĉa kanto de la fama operetkantisto Gösta Kjellertz kun akompano de orkestro.

KOMPRENEBLE ĉiu esperantisto volas havi tiujn du kantojn sur gramofona disko.

Prezo nur sved. kr. 3:50. ●

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.
Box 698 — Stockholm 1.

N:ro 4 en la serio de Sveda Esperanto-Federacio estas aperinta:

Per kio ni amuzu nin?

Societ- kaj dancludoj.

De Jakob Rosenberg kaj Ernfrid Malmgren.

Enhavas kolekton de la plej amuzaj kaj belaj ludoj endomaj kaj liberaeraj, svedaj dancludoj kaj ĉenkantoj.

Prezo: Sv. kr. 1:— (por anoj 0,50).

La antaŭe aperintaj numeroj de la serio estas:

1. *Hur leder man fortsättningskurser i Esperanto?* De Einar Dahl.
2. *La Esperanto-Klubo. Kiel fondi ĝin — Kiel organizi ĝin. — Kiaj estu la programoj?* De Ernfrid Malmgren. (En Esperanto.)
3. *»Lingva kvaronhoro».* De P. Nylén. (En sveda.)

NY LÄROBOK:

Snabbkurs i Esperanto

Av H. Seppik och Ernfrid Malmgren.

Särskilt avsedd för hotell-, restaurant-, bank- och trafikpersonal. Synnerligen enkel och trevlig. 10 lektioner.

Pris 60 öre.

Jo-Jo är glömt,

Lexicon

är namnet på den nyaste »flugan», som först uppstod i England och sedan dragit över flera länder som en stormvind. »Lexicon» är ett roande sällskapsspel. Det har nu utkommit i esperantoupplaga (det finns ännu icke på svenska!).

Pris pr spel kr. 3:—.

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a. — Box 698, Stockholm 1.

GÖSTA BERLING

La ĉefverko de Selma Lagerlöf

Esperantigis *Stellan Engholm*.

Ilustrita de *Einar Nerman*.

La historio pri Gösta Berling estas pli multe legita ol iu alia verko de sveda verkisto. En Svedujo ĝi estas eldonita jam en 34 eldonoj, kaj ĝi estas tradukita en 37 lingvojn. En preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo tiu libro estas legata kaj ŝatata, la verkistino estas amata kaj la geherooj de la rakonto estas admirataj.

Gösta Berling estas brilanta perlo de la literaturo tutmonda.

En la manoj de Selma Lagerlöf, »la granda poetino«, ĉiu homo, eĉ la plej simpla, malriĉa kaj mizera, fariĝas klare kaj bele sonanta instrumento, sur kiu la verkistino scias majstre ludi novajn melodiojn. En Gösta Berling ŝi brile pentras ne nur la vivon en sia hejmlando Vermland kaj la vivon de la tieaj bravaj, harditaj homoj, sed ŝi montras al ni la ecojn, bonajn aŭ malbonajn, en la profundo de la homoj.

La tradukon faris la talenta verkisto Stellan Engholm kaj la esperanta eldono estas ilustrita de la fama artisto Einar Nerman.

552 paĝoj. Luksa papero.

Prezo: broŝurita sv. kr. 6:—, tole bindita 7:50.

*Kiu legos verkojn de Selma Lagerlöf, devas unue legi Gösta Berling.
Ĝi estas ŝlosilo de multaj el ŝiaj postaj verkoj.*

Förlagsföreningen Esperanto u. p. a.

Box 698, Stockholm 1.
